

EL POPOLA ĈINIO

3

1973





Vjetnamio-Ĉinio (*Olepenraĵo*)

de Hia Hiangping

Ministrino Nguyen Thi Binh

Vizitis Ĉinion

Nguyen Thi Binh, Ministrino de eksterlandaj aferoj de la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio faris, laŭ invito de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko, oficialan kaj amikan viziton al la Ĉina Popola Respubliko, de la 27-a de decembro de 1972 ĝis la 1-a de januaro de 1973.

Dum la vizitado, Ministrino Nguyen Thi Binh ricevis ekstreme varman kaj solenan bonvenigon de la registaro kaj la popolo de Ĉinio.

Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Ministrino Nguyen Thi Binh kaj faris kun ŝi koran amikan interparolon. Nguyen Thi Binh diris: “Mi havas la honoron vidi vin, kara onklo Maŭ, ĝuste en la tempo, kiam la usona imperiismo faras militan eskaladon kontraŭ Vjetnamio. Tio ja estas ekstreme granda kuraĝigo por ni sudvjetnama popolo.” Prezidanto Maŭ diris al ŝi: “Ni ja estas samfamilianoj! Ni, vi, Suda kaj Norda Vjetnamio, kaj ankaŭ Laoso, Kamboĝo kaj Koreio ĉiuj estas samfamilianoj. Ni subtenas unu alian.”

Firmiĝas kaj disvolviĝas tagon post tago la frata amikeco kaj batala unuiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Suda Vjetnamio. La amika vizito de Ministrino Nguyen Thi Binh faris gravan kontribuon por pluapaŝe fortigi kaj disvolvi la tradician amikecon kaj batalan unuiĝon inter la popoloj de ambaŭ landoj.



Pekinaj amasoj varme bonvenigas Ministrinon Nguyen Thi Binh.





Prezidanto Mã
intervidiĝas kun
Ministrino Nguyen
Thi Binh.



Ministrino Nguyen Thi Binh kaj aliaj gastoj, antaŭ sia forlaso de Pekino, adiaŭas milojn da pekinaj popolanoj sur la aerodromo.

La Kampara Higiena Afero de Ŝandong-provinco

SANPROTEKTA RETO EN LA TUTA PROVINCO

Laŭ la alvoko de Prezidanto Maŭ "aktive preventi kaj kuraci malsanojn de la popolo kaj disvolvi la popolan aferon de medicino kaj higieno", la gvidanta organizo de medicino kaj higieno de Ŝandong-provinco mobilizis la amasojn por ke ili aktive partoprenu en preventado kaj kuracado de malsanoj. Kun la disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo, formiĝis en la tuta provinco reto de sanprotekta servo. Nun plurfakaj kaj specialaj hospitaloj estas starigitaj en ĉiuj tri niveloj de provinco, subprovinca regiono kaj urbo; ĉiu gubernio havas unu plurfakan hospitalon kun kelkaj filioj, kiuj troviĝas ĉe la komunumaj administrejoj fore de la gubernia urbo; ĉiu komunumo havas sian kuracan stacion; ĉiu brigado siajn kuracejojn kaj kamparanajn kuracistojn kaj ĉiu produkta grupo sian sanitariston. Nun, malgravaj malsanoj estas kuraceblaj en la produktaj brigadoj, ordinaraĵ malsanoj estas kuraceblaj en la komunumo kaj gravaj vundoj kaj malsanoj povas esti kuracataj en la gubernio.

En la lastaj jaroj, la higiena afero de la kamparo de la tuta provinco ricevis novan disvolviĝon. En 1971, la nombro de malsanulaj litoj en la kamparo plimultiĝis je 3.2-oblo, la investita sumo por fundamenta konstruado de higieno kreskis je 40.2-oblo kaj la elspezo por higiena afero kreskis je 3.2-oblo kompare kun tiuj de 1965; la ĉefaj antibiotikaj medikamentoj venditaj en la kamparo okupas pli ol 70 procentojn de tiu totala kvanto vendita en la provinco. Nun la plejparto de la guberniaj filiaj hospitaloj havas po 30 ĝis 50 malsanulajn litojn kaj parto de la kuracaj stacioj de la komunumoj po 20 ĝis 30. Nun la kuracaj stacioj de la komunumoj estas ekipitaj per instrumentoj por abdomenaj operacioj, operacia stablo, mikroskopo, oksigenujo, vertikala altprema desinfektilo, elektra fridujo, X-radia aparato ktp. La hospitaloj de gubernio kaj pli superaj niveloj ankaŭ laŭplane kulturis

teknikajn fortojn por la kuracaj stacioj de la komunumoj kaj samtempe ankaŭ transpostenigis iujn kuracistojn al ili. Kaj krome, rondiraj kuracaj taĉmentoj formitaj el urbaj kuracistoj donas konkretajn helpojn al la higienaj laborantoj en la bazaj niveloj por senĉese altigi ilian kuracarton.

La hospitalo de Ĝaŭjuan-gubernio elkulturis pli ol 50 kuracajn laborantojn en du jaroj por kuracaj stacioj de komunumoj. Nun, la kuracaj stacioj de la komunumoj de la tuta gubernio havas entute 410 malsanulajn litojn. Iuj kuracaj stacioj povas fari pli ol dek operaciojn, inkluzive de apendicektomio, subtotala gastrektomio, desekco de galveziko kaj cezara operacio. En 1970, la kuraca stacio de Fuŝan-komunumo en montregiono sukcese faris subtotalan gastrektomion al iu komunumanino, kiu dum pluraj jaroj ne povis partopreni en kolektiva laboro pro doloro de la stomako. En 1971, ŝi laboris pli ol 240 tagojn kaj estis elektita kiel modela komunumanino.

La laborantoj de la kuracaj stacioj de la gubernio ofte iras al la produktaj grupoj por servi al la amasoj per kuracado kaj livero de medikamentoj. De la jaro 1969, la kuracaj stacioj de la komunumoj helpis la 720 produktajn brigadojn de la gubernio starigi kuracejojn, elkulturis grupon post grupo 1,700 kamparanajn kuracistojn kaj 3,500 sanitaristojn. Serioze praktikante la principon ĉefe preventi malsanojn, ili disvolvis amasan patriotan movadon de higieno, propagandis sciojn pri prevento de malsanoj kaj helpis la amasojn reformi putojn, fornojn, necesejojn kaj stalojn por plibonigi la higienajn kondiĉojn. En la pasinta jaro, la kuracaj stacioj de la komunumoj kaj kuracejoj de la brigadoj faris pli ol 287,000 hom-fojojn da imunaj injektoj kontraŭ ok malsanoj kaj efike protektis la sanon de la komunumanoj.

Nun la plejparto de la kuracaj stacioj kaj kuracejoj de la tuta provinco starigis malgrandajn fabrikojn de medikamentoj, kiuj preparas diversajn kuracilojn el kuracherboj kaj aliaj drogoj de la ĉina

medicino kolektitaj kaj kulturitaj de iliaj laborantoj, kaj tiamaniere kontentigis la bezonon de medikamentoj por kuraci ordinarajn kaj oftajn malsanojn.

MEDICINAJ LABORANTOJ AL LA KAMPARO

En la jaro 1965, Prezidanto Maŭ elmetis la instrukcion "meti la gravitan punkton de la medicina laboro en la kamparon". Responde al tiu alvoko, la medicinaj laborantoj iris al la kamparo kaj montregionoj por servi al la amasoj. Multaj spertaj kuracistoj kun kuracila kesto iris de vilaĝo al vilaĝo, de domo al domo tiel en montregionoj malfacile atingeblaj kiel sur vastaj ebenejoj por kuraci malsanulojn, propagandi sciojn higienajn, disvastigi spertojn de preventado kontraŭ malsanoj, per tio ili akcelis la disvolviĝon de la higiena afero en la baza nivelo. En la lastaj jaroj, pli ol 3,800 urbaj medicinaj laborantoj estis senditaj al guberniaj filiaj hospitaloj kaj kuracaj stacioj de komunumoj, kaj kuracaj laborantoj je pli ol 75,200 hom-fojoj rondiris al vilaĝoj, fabrikoj kaj minejoj por preventi kaj kuraci malsanojn por la amasoj kaj tie ricevis varman akcepton. Foje dum rondira kuracado, Guo Maŭjong, vicestro de la kirurgia fako de la Popola Hospitalo de Ŝandong-provinco akceptis laboriston de proksima fabriko, grave frapitan de alttensia elektro. Kun helpo de lokaj medicinaj laborantoj kaj la aliaj membroj de la kuraca taĉmento li donis urĝan kuracadon senprokraste kaj eldanĝerigis la pacienton post kontinua kuracado de kvar tagonoktoj. Por savi malsanan infanon, la estro de la pediatria fako de la dirita hospitalo Jang Jaĉaŭ senhezite transfuzigis al ĝi sian sangon kaj savis ĝian vivon.

Rimarkindajn sukcesojn atingis la rondiraj kuracaj taĉmentoj ankaŭ en kulturado de medicinaj fortoj por la bazaj kuracaj unuoj. La dependa hospitalo de la Medicina Kolegio de Ŝandong organizis kuracan taĉmenton el kuracaj laborantoj bonaj en politiko kaj ideologio kaj kvalifikitaj por labori memstare. Tiu taĉmento estis sendita al la filia hospitalo de Linji-gubernio en Hiakoŭ-komunumo. Krom preventado kaj kuracado de malsanoj por la amasoj, ĝi ankaŭ instruis teknikojn al kuracaj laborantoj de la hospitalo, farante lekciojn pri teorio kaj demonstrante teknikajn manipulojn en praktika kuracado. Dum tri monatoj, sub helpo de la kuraca taĉmento, kuracistoj de la filia hospitalo savis 18 pacientojn en krizo kaj faris 56 relative malfacilajn operaciojn, escepte de 6 el ili.



Kuracisto de la Ĉin-medicina Hospitalo de Taj-an-gubernio fervore instruas sian lernantinon.

Urbaj medicinaj laborantoj de diversaj fakoj sin organizis en grupojn por fiksloĝadi en limregiono aŭ montregiono por konstrui aŭ pligrandigi lokajn hospitalojn. Miaŭŝan-komunumo de Lajvu-gubernio troviĝas en montaro malproksime de la gubernia urbo. De la jaro 1966, 13 spertaj kuracistoj kaj flegistinoj de interna medicino, kirurgio kaj ginekologio estis senditaj de urbo al la kuraca stacio de tiu komunumo por plifortigi ĝin. Nun la stacio jam povas fari operaciojn por ordinaraj vundoj, akutaj abdomenaj malsanoj kaj malfacila akuŝado kaj ankaŭ kuraci akutajn kaj gravajn malsanojn inkluzive de toksaj pulmito, disenterio kaj ŝoko. En la pasintaj 6 jaroj, ĝi faris 3,654 operaciojn. En 1972, nur 0.64% de la pacientoj akceptitaj de ĝi estis transsendita al supera hospitalo pro manko de necesaj kuracaj kondiĉoj.

La rondiraj kuracaj taĉmentoj, kuracistoj transsenditaj de urboj al la kamparo kaj lokaj kuracistoj kune esploras en kuracado pri terapioj de la ĉina kaj okcidenta medicino. Multaj hospitaloj starigis esploran grupon por kuraci malsanojn per terapioj de la ĉina kaj okcidenta medicino en kombino. Multaj kuracistoj de la okcidenta medicino ellernis la ĉinmedicinan kuracarton kun drogherboj kiel kuraciloj. Dank' al apliko de la ĉina kaj okcidenta medicino en kombino, 92.74% de pacientoj de B-tipa encefalito estis resanigitaj kaj oni povas kuraci multajn akutajn abdomenajn malsanojn kiel ekzemple truiĝon de stomako, intestan obstrukcon, eksteruteran gravediĝon, apendiciton, galŝtonon, sen operacio kaj sekve sen tiel multaj danĝeroj kaj

doloro al la pacientoj. Iuj hospitaloj ankaŭ atingis bonajn rezultojn en kuracado de reŭmatisma artrito, traŭmata membra paralizigo kaj sekvaĵo de infana paralizo, per la ĉina kaj okcidenta medicino en kombino.

Membro de la brigado Ligiaguangzi de Hiakiu-komunumo de Jehian-gubernio malsaniĝis en sia infaneco kaj kuŝadis surlite kun kurbigita korpo dum 12 jaroj. Lia talio arkiĝis, liaj gamboj paralizigis kaj membroj velkiĝis. En la pasinteco, oni multfoje kuracis lin per la ĉina aŭ okcidenta medicino sola kaj malsukcesis. Poste, oni lin kuracis per metodo de la ĉina kaj okcidenta medicino en kombino kaj post iom pli ol duona jaro li jam povis iri malrapide. Kaj post certatempa kuracado kaj ekzercado, li povas iri kun rekta talio kaj nun partopreni en kolektiva laboro.



Kuracistino de Ginan-a Hospitalo kulturaj sanitaristinojn por popola komunumo en kamparo.

En la medikamenta fabriko de produkta brigado de Ĵuŝan-gubernio, oni faras preparadon de medikamentoj el kuracherboj.



Koopera Kuraco de Jonghin-brigado

LASTATEMPE mi venis al Jonghin-brigado de Toŭdaŭ-komunumo de Jitong-gubernio, Gilin-provinco kaj invitis ĝiajn kadrojn, kuracistojn kaj komunumanojn al kunsido pri koopera kuraco.

Jen, estas la raporto pri la kunsido.

Jurnalisto: Hodiaŭ mi venis tien ĉi por informiĝi pri la koopera kuraco de via brigado. Kamarado Guo Hajking, vi estas sekretario de la partia filio de la brigado kaj respondeculo de administra komitato de la koopera kuraco. Bonvole parolu do unue!

Kampana kuracistino en praktiko



Guo Hajking: La koopera kuraco estas interhelpa kuracsistemo de komunumanoj, t. e. en la komenco de ĉiu jaro, ĉiu partoprenanto en la koopera kuraco pagas iom da mono, kiun kaj sumon elpezitan el la bonstatiga fonduso de la produktaj grupoj oni kolektas kiel la tutjaran komunan fonduson por kuracado, tiel ke la komunumanoj povas ricevi kuracan helpon sen plua pago.

Jurnalisto: Kiom da mono ĉiu devas pagi ĉiujare?

Guo Hajking: En 1969, kiam la koopera kuraco estis ĵus starigita, ĉiu persono pagis 1 juanon kaj la produkta grupo subvenciis ĉiun je 0.5 juano; en 1970 kaj 1971 ĉiu komunumano pagis 0.5 juanon kaj la produkta grupo subvenciis ĉiun ankaŭ je 0.5 juano; kaj en 1972 ĉiu pagis 0.3 juanon kaj la produkta grupo subvenciis ĉiun je 0.2 juano.

Jurnalisto: Kiel vi elpezas la kolektitan sumon? Ĉu la salajro de la kuracistoj estas elpezita el la sumo?

Guo Hajking: La kolektita monsumo de koopera kuraco elspeziĝas ĉefe por aĉeti medikamentojn kaj ankaŭ iujn necesajn kuracajn instrumentojn. La du kuracistoj alsenditaj de la ŝtato estas salajrataj de la ŝtato kaj la kamp ranaj kuracistoj ricevas laborpoentojn de la produkta grupo, la enspezo de tiuj lastaj egalas al tiu de mezaj aŭ superaj laborfortoj en sia produkta grupo.

Jurnalisto: Ĉu la kuracsistemo povas doni kontentigan kuracadon al la malsanuloj?

Guo Hajking: La koopera kuraco zorgas pri ĉiaj malsanoj, gravaj aŭ negravaj. En la lastaj jaroj, ni resanigis ne nur pacientojn de ordinaraj

Kuracistino Gaŭ Lianĝen (la dua de maldekstre) studas akupunkturon kune kun kamparanaj kuracistoj.



malsanoj, sed ankaŭ 31 maljunulojn de kronika malsano. Ekzemple, onklino Ĝaŭ de la tria grupo, kiu suferis de stomaka malsano pli ol 20 jarojn, nun estas resanigita.

Lu Gujĝi: Mi prenu min kiel ekzemplon. Mi suferis de astmo jam pli ol dudek jarojn ekde mia trijara aĝo. Mi fariĝis senutila homo kaj ĉiutage kuŝis en la lito, apogante mian kapon sur alta kuseno. En vintro mi povis nek fari dommas-trumadon, nek zorgi pri mi mem. Post apliko de la kuracsystemo, kuracisto kaj sanitaristo periode venis en mian hejmon por min kuraci. Post kuracado de pli ol unu jaro mi jam resaniĝis kaj laboras ekde 1971. La kuracpago de pli ol cent juanoj estis elspezita el la komuna fonduso por kuraco.

Ĵurnalisto: Ĉu la familioj kun multaj membroj, kiuj devas pagi relative multe, volas partopreni en la koopera kuraco?

Guo Hajking: Mi petas maljunan malriĉkamparanon Cuj Ĝendong paroli pri tio.

Cuj Ĝendong: Oni diras: "Neatendita malfeliĉo al homo falas, hazarda malsano ĉevalon trafas". Kiu partoprenas en koopera kuraco, ties sano estas garantiata en la tuta jaro. En printempo aŭ alia tempo oni faras al ni preventan injek-tadon, tiel ke ni vivas sane. Aliflanke, oni devas konsideri ne nur pri si mem, sed ankaŭ pri aliaj.

Tio povas efektiviĝi nur en la nova socio. En la jaro 1946, epidemio cirkulis en nia vilaĝo kaj for-rabis la vivon de 143 vilaĝanoj. Hodiaŭ en la kuracstacio de nia brigado troviĝas 5 kuracistoj, kiuj aplikas la ĉinan kaj okcidentan kuracmetodojn, kaj 3 kamparanaj kuracistoj kulturitaj de la gubernia hospitalo. Kaj en ĉiu produkta grupo de nia brigado estas sanitaristo kaj apoteko. Ĉiu malsanulo povas ricevi ĝustatempan kuracon kaj epidemio povas esti preventita.

Ĵurnalisto: Kamaradino Gaŭ Lianĝen, vi estas kuracistino, bonvole diru, kiajn malsanojn vi povas kuraci?

Gaŭ Lianĝen: Ni povas kuraci pacientojn de ordinaraj kaj kronikaj malsanoj, sed tiujn de akuta malsano bezonanta operacion aŭ malfacile diagnozebla malsano ni ankoraŭ ne povas kuraci.

Ĵurnalisto: Kiel do vi traktas tiujn malsanojn kiujn vi nun ne povas kuraci?

Gaŭ Lianĝen: Ni sendas tian pacieron al la supera hospitalo por kuraci je la kosto de la stacio.

Ĵurnalisto: Kiom da pacientoj vi sendis al la supera hospitalo en la lastaj jaroj? Kiom da mono vi pagis por tio? Kaj kiajn opiniojn pri tio la komunumanoj havas?

Gaŭ Liangĝen: De la starigo de la koopera kuraco en 1969 ĝis nun, ni sendis 28 pacientojn al la supera hospitalo kaj elspezis sume 476.3 juanojn. Ne nur la pacientoj, sed ankaŭ la komunumanoj estas kontentaj pri tio. Mi prenas Tian Ŝuĝen de la kvara produkta grupo kiel ekzemplon. En 1971, post kiam ŝi akuŝis, la ŝirvundo de ŝia utero cerviko kaŭzis multan sangadon. Ŝia vivo estis en danĝero. Tiam ni sendis ŝin al la gubernia hospitalo. Post ok tagoj ŝi elhospitaliĝis. Krom manĝokosto, 37.35 juanoj por operacio kaj aliaj kostoj estis tute pagitaj de nia stacio. Post la reveno de Tian Ŝuĝen, komunumanoj diris: "Se ŝi suferus tian malsanon en la malnova socio, ŝi nepre devus atendi morton pro manko de mono por kuraco; eĉ se ŝi estus resanigita, la kara kurackosto bankrotigus ŝian familion. Hodiaŭ, dank' al la koopera kuraco, ŝia sano kaj familia vivo estas garantiataj. Tia feliĉa vivo estas akirita sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio."

Ĵurnalisto: Ĉu la medikamentoj sufiĉas por multaj malsanuloj?

Gaŭ Liangĝen: Sufiĉas. Krom la konstante aĉetitaj, la ŝtato provizas nin en ĉiu trimestro per nombro da medikamentoj kiaj diversaj antibiotikoj, sendolorigiloj; samtempe komunumanoj mem plantas kaj kolektas ĉ. 100 specojn da drogherboj kun pli ol 3,000 kg. en ĉiu jaro. Nia brigado funkciigas malgrandan medikamentan fabrikan, kiu

produktas diversspecajn tablojdojn, pociojn kaj injektaĵojn el drogherboj. Tia faro estas bonvena al la komunumanoj.


Ĵurnalisto: Kiom da specoj de medikamentoj vi povas fabrikigi? Kaj sur kiajn malsanojn ili efikas?

Gaŭ Liangĝen: 271 specojn, el kiuj 43 estas injektaĵoj. Iuj estas uzataj por sendolorigo, senfebrigo, digestigo kaj en ekstera vundo, kaj aliaj por bronkito, artrito, renito, hepatito kaj aliaj.

Ĵurnalisto: Viaj paroloj min konigis, kiel via brigado efektivigas la kooperan kuracon. Vi kaj ĝeneraligis la higienajn sciojn kaj preventis la malsanojn, tiel ke altiĝis la nivelo de sano de la komunumanoj.....

Guo Hajking: La disvolviĝo de kuraca kaj higiena afero plifortigis la sanon de la komunumanoj kaj akcelis la produkton. Antaŭ la Liberiĝo, en nia vilaĝo troviĝis 97 familioj kun malpli ol 100 laborfortoj, el kiuj pli ol 20 familioj almozis tutjare. Tiam meznombra pomua produktokvanto de greno maksimume atingis 70 kilogramojn. Nun nia brigado havas 401 familiojn kun 796 laborfortoj viraj kaj virinaj. La meznombra pomua produktokvanto de greno atingis 200 kilogramojn. Ĉiu produkta grupo havas sian rezervon de greno.

Ĵurnalisto: Bone, ni finu nian kunsidon. Dankojn al vi, gekamaradoj!



Kampanaj kuracistinoj preparas medikamentojn.

Ŝi Denove Ekiras sur la Tero

IUN tagon, en koridoro de la pekina hospitalo Gongnongbing amaso da kuracistoj kaj fle-gistinoj emocie rigardis pacientinon malrapide paŝantan de la kvina etaĝo al la tria. Kiu povis imagi al si antaŭ ok monatoj, kiam tiu virino perdis siajn piedojn, ke ŝi povos denove iri sur la tero!

La afero okazis jene:

En la 10-a de januaro, 1972, Cuj Venĝi, membrino de Vangsiĝing-komunumo de Ĉaŭĵang-kvartalo de Pekino, estis grave vundita de radoj de trajno kaj tuj sendita al la nomita hospitalo. La meza kaj malsupra partoj de ŝia dekstra kruro tute frakasigis kaj restis nur la derompita piedo en la ŝuo. La tendenoj kaj ostoj malsupre de la maleolo de la maldekstra piedo estis dispecigitaj. Por savi la vivon de tia vundito, kutime oni devas amputi la krurojn. Gvidantoj kaj kuracaj laborantoj de la hospitalo diskutis pri aplikenda kuracmetodo starante ĉirkaŭ Cuj Venĝi. “Tiu piedo” iu diris rigardante la rompitan piedon, “estas kompare kom-pleta, se ni forĵetos ĝin, ŝi havos neniun piedon...” Amputo estas facila por kuracisto, sed tio signifas, ke la 29-jara Cuj Venĝi ne povos piediri nek partopreni en fizika laboro. Kuracistoj diris, ke la amputo certe portos al ŝi dumvivan afliktiĝon. Kio estas la alternativo? Ili pensis en si, ke ilia nobla devo estas ĉiamaniere savi la vivon de pacientoj, mildigi ilian doloron kaj ilin resanigi. Iuj kuracis-toj diris: Kvankam la dekstra piedo kaj la maldekstra gambo estas malsamaj en la direkto, tamen iliaj sekcaj edroj estas kunigeblaj. Tamen ĉu oni povos ilin kunigi?

Tiu kuraĝa propono ricevis subtenon kaj kuraĝigon de la gvidantoj de la hospitalo.

Ili tuj invitis Li Liangping, kirurgon de Giŝuj-tan-hospitalo, por interkonsiliĝi pri la operacio. Mankis al ili sperto en tia operacio, sed ili havis komunan opinion, ke kuracistoj devas fari centpo-centan klopodon, se nur estas centono da espero. La kuracistoj decidis efektiviĝi sian esperon per zorgema laboro.

Komenciĝis la transplantado de la rompita piedo.

Post plurfoja lavado, la kompleksaj vundoj prezentiĝis antaŭ la kuracistoj. Inter la senordaj rompitaĵoj, ne distingeblaj estis la tendenoj, sensaj nervoj, motoraj nervoj kaj angioj. Kiel oni povas kunigi tiujn rompitaĵojn senerare? Ĉu iliaj long-gecoj estas konvenaj? Ĉio devas esti precize farita.

Cuj Venĝi ekzercas iradon.



Tempo forpasis sekundon post sekundo, kaj ŝvitis la frunto de la kuracistoj.

Forpasis 6 horoj. La ostoj, tendenoj, nervoj kaj du vejnoj estis lerte kunigitaj. Poste la operacio transiris al la ŝlosila stadio: kunigi la pieddorsan arterion.

Doktoro Li absorbite kunkudris la rompitan maldikan arterion per pinglo malpli dika ol haro. Post la rekunigo, la kuracaj laborantoj kun granda espero atendis trapason de la sango. Kiam la angia pinĉilo malstreĉiĝis, la malvarma kaj pala piedo iom post iom ruĝiĝis. Jen la koloro de vivo! Faciliĝis la koro de la kuracistoj, sed post malpli ol dek minutoj, ĉesis la sangocirkulado de la pieda arterio kaj la piedo denove paliĝis! Kio kaŭzis tion? Oni tuj faris trapikan ekzamenadon kaj trovis trombozon. Ili rapide forigis ĝin, sed baldaŭ la sangocirkulado ĉesis denove.

Post la du malsukcesoj en la kunigado, la kuracistoj atente observis por trovi la kaŭzon de malsukceso. Rememorante la malsukceson de pasinta operacio, doktoro Vej Gianing de Giŝujtan-hospitalo, kiu alvenis por tiu operacio, rimarkis ke la kunigo estis farita ĉe la piedpojna vundo. Tia kunigo malhelpas la sangon cirkuladon, kiam la piedo kurbiĝos kaj formos angulon de 90°. Li tirlongiĝis la arterion malsupren iom for de la vundo kaj lerte faris ok kudrerojn.

La kunkudro de la arterio sukcesis! Sango rapide fluis en la piedon kaj ĝin revivigis. La unuapaŝa sukceso portis feliĉan ĝojon al la kuracaj laborantoj, okupiĝantaj pri la operacio dum sinsekvaj dek horoj.

Kvankam la piedo estis transplantita, tamen la vojo por ĝin kuraci estis ne glata.

18 tagojn post la operacio, infektiĝis kaj nekroziĝis plejparto de la transplantita epitelio sur la pieda dorso. Dank' al la klopodo de la kuracaj laborantoj dum pli ol dek tagoj, pusado ĉesis kaj nekrozitaj histoj foriĝis, tiel ke elkreskis nova haŭto.

Poste la kuracaj laborantoj aplikis fizikan terapion al ŝi kaj helpis ŝin ekzerci la piedon, por ke ĝi restarigu sian funkcion.

Kiam Cuj Venĝi unufoje iris per la maldekstra piedo transplantita, ŝia


gambo tremis senĉese kaj la korpo svingiĝis, de sur ŝia frunto ruliĝis ŝvitgutoj kaj la kunigita parto de la kruro ege doloris al ŝi kvazaŭ ĝin pinĉus tenajlo. La apude starantaj kuracistoj kaj flegistinoj ŝin kuraĝigis senĉese: "Cujnjo, persistu, kaj persistado kondukos al la venko!" Post peniga ekzercado de kelkaj monatoj, Cuj Venĝi jam povis stari plurajn horojn.

Por ke ŝi povu piediri kiel sana homo, la hospitalo petis, ke la Pekina Fabriko de Artefaritaj Membroj projektu por ŝi ortopedian ŝuon kaj artefaritan kruron. En la sekvanta tago post instalo de krura protezo al la dekstra gambo, Cuj Venĝi piediris pli ol unu km. sen helpo de apogilo.

Rigardante sian transplantitan piedon, Cuj Venĝi diris emocie: "Se mi, ordinara kamparanino, trafus tiel gravan vundon en la malnova socio, mi eble perdus la vivon, kaj tute neimagebla estis kunigo de la rompita piedo. Mi dankas Prezidanton Maŭ, la Komunistan Partion de Ĉinio kaj la kuracistojn kaj flegistinojn, kiuj zorgas min tage kaj nokte."

Post ekzameno, kuracistoj konstatis, ke la sangocirkulado de la revivigita piedo estas normala, la kunigitaj ostoj, tendenoj kaj nervoj restarigis sian funkcion kaj la plando havas senson de varmo kaj tuŝo. Nun Cuj Venĝi denove iras sur la vojo de socialisma konstruado.

La dekstra piedo de Cuj Venĝi sukcese transplantita al ŝia maldekstra kruro



Ĉinaj Drogoj

PRENI MOSKON DE VIVA MOSKULO

Mosko sekreciata de sovaĝa moskulo (*Moschus moschiferus*) estas valorega drogo kaj altklasa parfumo. De antikveco en Ĉinio, oni devis mortigi sovaĝan moskulon por preni el ĝi moskon. Tiu metodo malutilis al la generado de sovaĝaj moskuloj kaj ne povis altigi la produktan kvanton de mosko. De la jaro 1958, la moskul-bredejo de la Ĉuanhi-a Forstokultura Departemento de Siĉuan-provinco, kaj tiu de Ĝenping-gubernio, Ŝenhi-provinco, provis bredi moskulon, kaj ili iom post iom konis la leĝojn de ĝia vivo kaj generado. Post dresado, la sovaĝaj moskuloj, malpaciencaj, izoligemaj kaj timemaj, povas esti bredataj en grego. Resuminte sian sukcesan sperton, ili ellaboris kompletan metodon por preni moskon de viva moskulo, kiu ne influas la sanon kaj generadon de moskulo kaj poste la moskulo ankoraŭ povas sekrecii moskon. Kaj sur tiu bazo, ili pluapaŝe esploris kiel moskulo sekrecias moskon. Dank' al tio ili povas preni moskon en ĝusta tempo, kun alta produkto-kvanto kaj bona kvalito.

BREDADO DE HIPOKAMPOJ

Hipokampo estas uzata kiel kara ĉina drogo por korpofortigo, seninflamigo, sentumorigo, senfebrigo kaj analgeziko. En la pasinteco, ĝia natura fonto estis malvasta kaj produktokvanto malalta, tial ne kontentigebla estis la bezono de la disvolviganta higiena afero.

De la jaro 1970, la laboristoj kaj oficistoj de hipokampo-bredejoj de Hajfeng-gubernio, Guangdong-provinco, kaj de Ĝingiang-gubernio, Fugian-provinco, en strikta kunlaborado de koncernaj scienc-esploraj institucioj kaj post ripeta eksperimentado, iom post iom akiris materialon pri kreskado kaj viva kutimo de hipokampo, kaj per tio pruvis ke hipokampo povas esti bredata. En somero, kiam abundas nutraĵoj, eloviĝinta hipokampo post trimonata bredado povas esti uzata kiel drogo.

MUSKARDINA KRIZALIDO KIEL DROGO

Seka korpo de silkraŭpo mortinta pro infekto de fadenforma fungo (*Beauveria bassiana*) estas unu el la ofte uzataj ĉinaj drogoj kaj havas bonan efikon kontraŭ febro kaj tuso kaj en trankviligo k. a. En la pasinteco, la kvanto de silkraŭpoj mortintaj pro muskardino estis malgranda.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, strikte kunlaborante la Instituto pri Animaloj de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj pekinaj kokon-elbobena, medikamenta kaj scienc-esplora unuoj prenis krizalidojn, forĵetitajn de kokon-elbobenejo kiel kulturan medion kaj inokulis ilin per fadenforma fungo, por ke ili fariĝu drogo post fermentado. Klinika praktiko pruvis ke ilia kuracefiko estas fundamente egala al tiu de muskardinaj silkraŭpoj.



Mi Amas la Vastan Kamparon

EN 1962, respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, mi venis, post mia diplomigo el la supera mezlernejo, de Pekino al la produkta brigado Doŭgiakiaŭ de Baŭdi-gubernio, Hebej-provinco por tie enloĝiĝi. Dum la komenca periodo, komunumanoj min demandis: “Hoŭ Gjun, ĉu vi ne timas malfacilojn veninte al kamparo?” “Ne!” Respondis mi. “Ju pli malfacila estas la medio, des pli bona estas la ŝanco por hardi mian revolucion volon. Se mi ĝin timus, mi ne alvenus.” Ili tre ĝojis pro tio kaj min laŭdis. La komunumanoj donis al mi entuziasman, senlaca helpon kaj en politiko kaj en produktado. Mi ĉiam vivas sub ilia varma prizorgado. Post multa ŝanĝigo en miaj penso kaj sentimento, nun mi amas Doŭgiakiaŭ kaj des pli ĝiajn komunumanojn.

Dum la komenca periodo, mi estis entuziasma kaj povis fari laboron eĉ penigan. Tamen post relative longa tempo, mi pensis ke mi ne povos fari ian promesplenan aferon en la kamparo, tial mia entuziasmo malvarmiĝis. Mia deprimiĝo vekis atenton de komunumanoj. Avo Guan Juĉeng diris al mi elkore: “Ne vi havas neniun perspektivon en la kamparo, sed via koro kuris for de ni komunumanoj!” Tiujn vortojn mi tiam ne konsentis en la koro. Iutage, nia laboro finiĝis iom malfrue, mi ne volis mem prepari manĝon kaj sola sidis kolere sur la porda sojlo. Onklino Ki alvenis kaj min demandis: “Kial vi ne preparas manĝon?” Mi respondis: “Estas sensencaĵo, ke oni ĉiutage laboras kaj manĝas, manĝas kaj laboras! Se mi laborus en institucio aŭ kultivejo, mi povus preni manĝon en la manĝejo tuj post la laboro. Kiel do estus tiaj tedaĵoj”. “Kiel feliĉa estas via hodiaŭa vivo, mia filino,” diris la onklino. “Ĉu vi ankoraŭ tediĝas je preparo de manĝo, havante rizon kaj farunon?! Antaŭ la Liberiĝo, almozpeto por ni malriĉuloj estis malfacila kaj mankis al ni eĉ brano por prepari manĝaĵon! Ni multe amas nian hodiaŭan vivon, kial vi ankoraŭ tediĝas pri tio? Ni devas ne forgesi la pasintan mi-

zeron kaj klopodi por la socialismo!” Je tio ŝi volis por mi prepari manĝon, kaj mi ne povis rifuzi ŝian helpon, sekve ni kune tion faris. Dum la preparado la onklino rakontis al mi pri la mizero en la malnova socio kaj la hodiaŭa feliĉo. Post ŝia foriro, ŝiaj vortoj ankoraŭ resonis ĉe miaj oreloj. Same kiel mi, ŝi laboris la tutan tagon, sed ŝi ne nur ne tediĝis pri preparo de manĝo, kaj eĉ ankaŭ preparis manĝon por mi; mi konsideras nur mian “perspektivon”, sed ŝi ĉiam volas bone labori por la socialismo. Ju pli mi pensis, des pli sentis la vortojn de Avo Guan pravaj. Mia koro kuris for de la komunumanoj kaj miaj penso kaj sento ja diferencas de la iliaj. En profunda nokto mi malfermis verkon de Prezidanto Maŭ kaj denove legis liajn instruojn: **“Ĉiuj intelektuloj, kiuj povas labori en la kamparo, devas ĝoje iri tien. La kamparo estas vasta mondo, kie oni povas multon fari.”** Tiuj vortoj donis al mi grandan forton kaj plifirmigis mian decidon por revolucii ĉiam en la kamparo. De tiam mi klopodis por min hardi en peniga medio, tiel ke mi ŝanĝis miajn maldiligentemon kaj mankon de scio pri grenplantoj, venkis miajn fieron kaj sindorlotemon.

La instrukcio de Prezidanto Maŭ ankaŭ komprenigis min, ke la intelektaj gejunuloj venas al la kamparo ne nur por akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, sed ankaŭ por ludi pli grandan rolon tie. Sekve, mi rakontis al la komunumanoj revoluciajn rakontojn kaj instruis al ili revoluciajn kantojn. Ni ankoraŭ organizis kantogrupon, tiel ke la kultura vivo en nia vilaĝo pli vigliĝis.

Por propagandi la orientilojn kaj politikojn de la Partio kaj konigi al la komunumanoj gravajn aferojn en- kaj ekster-landajn, ni ankoraŭ fondis kulturajn stacion, en kiu sin trovas grupoj de ĵurnallegado, bild-rigardado, arta prezentado. Ni mem verkis kaj prezentis multajn programerojn por pri-kanti novajn homojn kaj novajn aferojn de nia vilaĝo, kiuj ricevis aprobon de la amasoj. Ne nur ge-

junuloj partoprenas en aktivadoj de la stacio, sed ankaŭ maljunuloj kaj infanoj interesiĝas pri ili.

Kun la alveno de la alta tajdo de socialisma konstruado en kamparo, la vastaj amasoj de komunumanoj havas urĝan postulon pri kultura vivo. Subtenate de la brigada partia filio, mi kaj kelkaj aliaj intelektaj gejunuloj starigis popolan lernejon kaj mi fariĝis instruistino de ĝia mezgrada klaso. Ĉiutage, kiam mi vidis, ke komunumanoj vizitas nian lernejon, mi konsciis mian devon grava. Mi klopodis por bone prepari mian lecionon. Mia serioza sinteno en la instruado multe vekis entuziasmon de komunumanoj kaj la lernantoj ĉiam pli multiĝis. Multaj pasintaj analfabetoj nun jam povas legi libron kaj ĵurnalon kaj malaltkleraj personoj plie progresis.

Krome, la brigada partia filio asignis al mi oficon de politika instruisto de la milicanoj por doni al ili periodan lecionon pri politika scio, skribi artikolojn por ilia murgazeto, ĝin dekoracii, solvi problemojn ktp.

Ĉiutage mi estis tre okupata kaj iam eĉ devis dormi kaj ripozi malmulte, sed mi sentis ke tia vivo estas signifiĉa.

En la komenco de 1965, mi kaj miaj junaj amikoj starigis sciencan eksperimentan grupon. La

plejparto el la agroj de nia brigado estis alkalaj kampoj, kies pomua produktokvanto de greno neniam superis 50 kg. en la pasintaj jaroj. Por elimini la alkalon, nia grupo vizitis veteranajn kamparanojn kaj konis, ke alkalo facile solviĝis en akvo. Laŭ tiu karaktero, ni fosis drenajn kanaletojn kaj formis alkal-lavajn bedojn en la kampoj, kaj la alkalo en la tero estis forigita. En la sekvanta jaro ni akiris grandarean riĉrikolton de maizo, kaj la meznombra pomua produktokvanto kreskis je pli-ol-6-oblo.

Nia grupo okupiĝas ankaŭ pri eksperimenta kulturado de bonspeciaj agrikulturaj plantoj. En iuj kazoj niaj eksperimentoj malsukcesis, sed ni persistis en nia klopodo. En la lastaj jaroj, post ripetaj eksperimentoj, ni elkulturis bonspeciojn de hibridigitaj sorgo kaj maizo, tiel ke multe kreskis la produktokvanto de greno de nia brigado. Krome, nia grupo sukcese faris miksan kulturadon de tritiko kaj ajlo kun maizo kaj kotono, kio ankaŭ altigis la pomuan produktokvanton. La greno kaj kotona produktokvanto de nia brigado estas pli-ol-5-oble pli multa ol tiu de la plej bona rikolto antaŭ la Liberiĝo.

En la lastaj jaroj, el la intelektaj gejunuloj de nia brigado iuj laboras kiel gvidantoj de la brigadaj partia filio kaj revolucia komitato, aliaj kiel instruis-



Hoŭ Gjun (la dua de dekstre) lernas agronomiajn sciojn kune kun intelektaj junulinoj venintaj el urboj por partopreni agrikulturan produkton.

toj kaj kamparanaj kuracistoj, triaj kiel agrikultu-
raj teknikistoj kaj traktoristoj, kontribuante sian
forton por konstrui la socialisman novan kamparon.
Mi estis elektita de la partianoj kaj amasoj kiel
membro de la partiaj komitatoj kaj revoluciaj ko-
mitatoj de la subprovinco kaj gubernio, sekretario
de nia brigada partia filio kaj estro de
ĝia revolucia komitato.

Dank' al la komuna klopodo de
la komunumanoj kaj intelektaj geju-
nuloj, okazis profunda ŝanĝiĝo en
Doŭgiakiaŭ dum la lastaj dek jaroj:
La antaŭa sceno "En printemp' se-
keco ĉie regas, dum aŭtun' inundo ĉie
tegas," jam forpasis por ĉiam. Kaj
nun prezentiĝas antaŭ ni alia sceno:

*Kanaloj retiĝas, kaj kampoj
kvadratoj ligiĝas,
Salikoj kaj poploj ĉarmverdaj
kolone viciĝas.
Kristala putakvo l' vilaĝon ĉir-
kaŭiras,
Surkampe l' "ferbovoj" muĝege
sin tiras,
Orbrilaj rizplantoj arome la
homojn altiras.*

.....

Bedaŭrinde ke mi ne estas poeto, kaj la beleco
de socialisma kamparo por mi ne povas esti plene es-
primata per precizaj vortoj. Mi volas esti diligenta
"pentristo" en kamparo kaj pentri per miaj manoj
novan kaj pli belan bildon kune kun la komun-
umanoj!



Hoŭ Gjun (en fronto) kolektas kotonon.



*Hoŭ Gjun esploras
kune kun siaj ka-
maradoj la novan
specion de maizo
de ili elkulturitan.*

Kamparana Selektisto

Laj Hongde

L AJ Hongde laŭde titolata de la amasoj kiel kamparana selektisto, estas sekretario de la partia filio de la sesa produkta brigado de la popola komunumo Magia en Siĉuan-provinco. De pli ol dek jaroj li gvidas la sciencan eksperimentan grupon de la brigado por selekti bonajn speciojn, plibonigi la sistemon de kulturado, akceli la disvolviĝon de la agrikultura produkto, kaj ricevis laŭdon de la amasoj.

Laj Hongde havas ĉirkaŭ 50 jarojn. Li devenis de malriĉkamparana familio. De la infanaĝo Laj Hongde havas intereson por esplori la demandon kiel kulturi kaj rikolti diversajn plantaĵojn. Li ofte aŭdis de plenaĝuloj: "Prefere ŝanĝi semojn ol kampojn." Kiel la juna Laj Hongde esperis provi la aserton! Sed lia espero restis nur vizio, ĉar tiam la kampoj apartenis al bienuloj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, Laj Hongde fariĝis mastro de la ŝtato same kiel la ceteraj malriĉaj kamparanoj kaj komencis tute novan vivon. La Partio kaj registaro sendis lin al la gubernia agrikultura teknika kurso. Tiam Laj Hongde ekkomprenis la signifon de scienca eksperimento en agrikulturo kaj pli interesiĝis pri tio. Post la reveno al la vilaĝo, oni elektis lin kiel teknikiston de la tiama agrikultura produkta kooperativo kaj poste kiel vicestron de la altgrada agrikultura produkta kooperativo.

De post la fondiĝo de popola komunumo li aktive klopodas kun la amasoj por enkonduki bon-speciajn plantojn de aliaj lokoj kaj disvastigi progresintajn kulturmetodojn, tiel ke plialtiĝis paŝo post paŝo la produktokvanto de rizo, tritiko, kolzo kaj terpomo de la brigado. En la jaro 1963, la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "Klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento estas tri grandaj revoluciaj movadoj en konstruado de potenca socialisma lando" multe entuziasmigis Laj Hongde, kiel estro de produkta grupo. Li pensis, ke ankaŭ la kamparanoj devas aktive

entrepreni eksperimentadon en agrikulturo por levi la produktokvanton de greno kaj oledonaj plantoj kaj kontribui per tio al la konstruado de la socialisma patrolando. Tial li fondis la unuan scienc-eksperimentan grupon de la tuta komunumo. Sur ĝin la amasoj metis grandan esperon kaj proponis ke ĝi eltrovu rimedon por pliproduktigi kolzon.

Laj Hongde kaj lia grupo foje-refoje analizis la kaŭzojn de malalta produkto de kolzo laŭ la opinio de la amasoj. Ili trovis, ke la kulturata kolzo jam degeneris sen selektado dum jaroj. Ili enkondukis iun bonan specion de kolzo nomata "Ŝengli", kaj la produkto rimarkinde pliiĝis. Sed tiu nova kolzo maturiĝis malfrue, malfavore al plantado de rizo sur la sama kampo kaj ĝia produktokvanto. Por eviti tion Laj Hongde decidis selekti novan altproduktan kolzospecion, kiu devas maturiĝi frue konforme al tieaj kondiĉoj. Lia opinio trovis subtenon de la gvidantoj de la gubernio, kiuj eĉ sendis agrikulturajn teknikistojn por helpi ilin. La scienca eksperimento de Laj Hongde komencis mem kulturi bonan specion per interkrucigoj anstataŭ nure enkonduki kaj selekti alilokajn bonajn speciojn.

En printempo de 1965, kiam sur la verdaj kolzaj kampoj arome pompis orflavaj floroj, Laj Hongde kaj liaj grupanoj elektis kaj markis per tabuletoj taŭgajn individuojn prepare por arta polenado interkrucige. Ili atente observis de mateno ĝis vespero la elvolviĝon kaj naturan fekundigon de kolzaj floroj kaj detale notis ĉion viditan. Ili trovis, ke la kolzaj floroj ĝenerale malfermiĝas de la 9-a ĝis la 10-a horo matene, la polenoj maturiĝas nelonge post tio, kaj tuj poste la stamenoj nature komencas doni polenon. Tiel ili malkovris la ĝustan tempon por fari artan polenadon. Laj Hongde kaj liaj grupanoj tre zorgeme faris kolektadon kaj artan donon de poleno. Post diligenta laborado

en sinsekvaj jaroj fine ili sukcesis ricevi novan bonan specion kiun ili nomis "Riĉrikolto n-ro 4", kiu frue maturiĝas, riĉe produktas, ne kliniĝas fruktoportante kaj oleon produktas alt-pocente. Kompare kun la loka kolzo ĝi donas duoblan produktokvanton, kaj kompare kun la enkondukita ĝia produkto pliĝas per 20%.

En sia scienca eksperimenta laboro, Laj Hongde aparte atentis por lerni de la amasoj, serioze prikonsideris ilian riĉan sperton kaj tiel senĉese altigis siajn laboratingojn. Poste Laj Hongde trovis, ke ĉe la specio "Riĉrikolto n-ro 4" okaze ankaŭ mankas grajnoj ĉe la fino de silikvoj, kiel ĉe aliaj specioj. Por solvi tiun problemon, li movis la komunumanojn serĉi la kaŭzon kaj kontraŭrimedon. Laŭ la propono de iu maljuna kamparano, Laj Hongde donis apartan sterkon por la florperiodo kun sukcesa rezulto. Kaj la produktokvanto

Laj Hongde (la meza en la fronto) observas kune kun siaj gekamaradoj de la eksperimenta grupo kreskadon de bonspecia tritiko.



plialtiĝis per 10-15 kg. po muo. Poste li kune kun amasoj plie esploris la regulojn de la kreskado de la nova specio, resumis la sperton de racia sterkado kaj scienca surkampa flegmetodo tiel ke ĝia produktokvanto altiĝis plie, kaj ĝia pomua produktokvanto en granda plantareo atingis 211 kg.


La laboratingoj de Laj Hongde ricevis atenton de la Partio kaj registaro. En la jaro 1969 li estis sendita al Pekino por partopreni la celebradon de la 20-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kiel delegito de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Sur la grandioza Tiananmen-pordego li feliĉe vidis Prezidanton Maŭ.

Reveninte de Pekino, Laj Hongde raportis al komunumanoj pri tiu sia feliĉa sperto kaj pri novaj atingoj de la konstruado de la patrolando. Kaj ĉio ĉi tio stimulis lin kaj lian produktan brigadon al trovado de nova vojo al pliprodukto.

En la regiono, kie loĝas Laj Hongde, ĉiujare la terkulturistoj ricevis antaŭe du rikoltojn kaj neniam plantis rizon dufoje. Ili decidis selekti bonspeciajn rizon kaj tritikon renovigi kulturan sistemon por akiri tri rikoltojn en ĉiu jaro. En la lastaj jaroj tiu brigado sub la instigo de Laj Hongde enkondukis kaj renovigis multajn alilokajn bonajn speciojn. Post senĉesa provado ili fine sukcesis akiri tri rikoltojn jare. La pomua produktokvanto de greno de la brigado superas 800 kg.

Pro siaj rimarkindaj meritoj Laj Hongde plurfoje ĉeestis agronomiajn konferencojn de Siĉuan-provinco. Multaj agronomiaj institutoj kaj popolaj komunumoj invitis lin fari prelegojn kaj raportojn pri sia sperto. Nun la specio "Riĉrikolto n-ro 4" estas disvastigata en la tuta provinco, kaj la kamparana selektisto plue faras novajn konkerojn en la kampo de agronomio.





Angulo de la gubernia urbo Tajsan

Tajsan—Hejmloko de Ĉinaj Elmigrintoj

KUANG HIN

VETURINTE per aŭto pli ol 130 kilometrojn sudokcidenten de la urbo Kanton en suda Ĉinio, ni atingis Tajsan-gubernion — hejmlokon de ĉinaj elmigrintoj. En la vilaĝoj ĉe la montpiedo bonorde viciĝas etaĝaj domoj, en la kamparo verdas rizplantoj, sukerkanoj kaj aliaj plantoj sur montdeklivoj kaj ambaŭflanke de ŝoseoj dense kreskas fruktaroj kaj bambuoj, kaj komunumanoj gaje laboras en la kampoj. Ĉie regas prospero.

Tajsan estas bela kaj riĉa loko ĉe la bordo de la Suda Maro. Tie troviĝas ebenejo, montetoj kaj altaj montoj. En la malnova socio, tie ofte okazis sekeco kaj inundo. La greno rikoltita de la tuta gubernio sufiĉis por konsumado de ĝia loĝantaro nur dum duono da jaro eĉ en abunda rikolto. Pro sekeco en la jaro 1943, 150,000 homoj de la tuta gubernio mortis de malsato, kaj dekoj da miloj da homoj forfuĝis.

Antaŭ pli ol 100 jaroj, sub la ekspluatado kaj subpremado de la reakcia reganta klaso kaj trompate de fremdaj koloniistoj, tajsan-anoj unuj post aliaj dolore forlasis la hejmlokon kaj migris al fremdaj landoj por akiri vivrimedojn. Multaj el ili dronis en ondegoj de Pacifiko dum veturado per lignaj boatoj. Tiuj kiuj atingis fremdan landon estis pelitaj de koloniistoj al dezertaj kaj sovaĝaj montoj por ekspluati virgan teron, konstrui fervojojn aŭ fosadi ercojn. Ili baraktadis kontraŭ morto. Ĝis nun, pli ol 179,000 elmigrintoj de la gubernio loĝas en 61 landoj kaj regionoj de 5 kontinentoj. Pli ol 113,000 el ili estas elmigrintaj al Ameriko, tial Tajsan estas nomata “Hejmloko de Ĉinaj Elmigrintoj en Ameriko”. Sed, tiam Tajsan estis dezerta kaj mizera hejmloko de elmigrintoj.

En 1949, Tajsan-gubernio estis liberigita. En la pasintaj pli ol dudek jaroj, sub la direktado de

la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la tajŝan-anoj unuanime konstruis la hejmlokon, tial ĝiaj industrio kaj agrikulturo disvolviĝis samtempe. Nun ĝia fizionomio multe ŝanĝiĝis. De la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la tajŝan-anoj energie dragis riverojn, altigis kaj larĝigis digojn kaj reordigis akvoutiligan sistemon de irigacio kaj dreno, tiel ke pli ol 53,000 hektaroj da rizkampo de la tuta gubernio fundamente fariĝis riĉrikoltaj malgraŭ sekegeco kaj inundo. En printempo de 1971, ĉi tie okazis sekegeco pli serioza ol tiu de 1943. Tamen dank' al akvoutiliga konstruado, la totala produktokvanto kaj la pomua produktokvanto de greno ambaŭ superis la plej altan nivelon en la historio. La tuta gubernio ne nur efektivigis plenan memprovizon de greno, sed ankaŭ liveris al la ŝtato 105,000 tunojn da superbezona greno. Ankaŭ la produkto de sukerkanoj, arakidoj, akvoproduktaĵoj kaj porkoj ricevis relative grandan disvolviĝon kompare kun tiu de la pasinteco. En la pasinteco, ĉi tie la montaro estis kalva, kaj akvo kaj grundo perdiĝis serioze. Nun, ĉie ĉi tie kreskas pinoj, eŭkaliptoj, cedroj, bambuoj kaj mandarinarboj, bananarboj, umearboj, prunarboj, pirarboj k. a.

En la tempo de la Liberiĝo, en la tuta gubernio estis nur du presejoj kaj malgranda elektrejo kun kapacito de malpli ol 100 kilovatoj. Post la Liberiĝo, oni konstruis unu post alia karbominejon, elektrejon, ŝipkonstruejon, ŝpinteksejon, vinpreparejon kaj prilaborejon de greno kaj oleo kaj fabrikojn por farado de maŝinoj kaj cemento. En la lastaj jaroj, rapide disvolviĝis ankaŭ la industriaj branĉoj de kemia sterko, insekticido, elektraj fadenoj bezonataj de agrikulturo, afinaciado de ŝtalo, ferfandado kaj elektromaŝinoj. Nun, la 24 komunumoj de la gubernio ĉiuj havas po fabrikon de agrikulturaj maŝinoj ekipitan per torniloj, ebeniga frezmaŝino kaj bormaŝino. La vilaĝoj fundamente efektivigis lumigadon per elektraj lampoj. Oni jam tute efektivigis mekanikigon en irigacio, drenado kaj prilaboro de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. En la tuta gubernio oni konstruis ŝoseojn kun totala longeco de pli ol 950 kilometroj, tiel ke ĉiuj komunumoj kaj 80% de la brigadoj de la gubernio estas atingeblaj per aŭto. Ankaŭ eduko estas multe ĝeneraligita en ĝi. Ĉiu komunumo havas sian superan mezlernejon kaj hospitalon, kaj ĉiu brigado sian malsuperan mezlernejon kaj kuracan stacion,

Volejbola maĉo inter produktaj grupoj





Gelernantoj de la Unua Mezlernejo de Tajŝan faras megafonon.



Riĉa rikolto de sukerkanoj


kaj ĉiu produkta grupo kamparanan kuraciŝton. La amasa sporta aktivado de la gubernio estas tre vigla. Ĝi estas fame konata tra la tuta Ĉinio kiel “loko de volebalo” kaj nun havas pli ol 5,300 amatorajn volebolajn grupojn.

La gvidanta oficejo de la gubernio tre bone aranĝis laboron kaj vivon de la elmigrintoj revenintaj al tiu loko. Iuj el ili estas instalitaj en fabrikoj, kultivejoj kaj vilaĝoj por konstrui socialismon, aliaj laboras kiel kadroj de la ŝtato. Sub la zorgo de la popola komunumo, iuj maljunaj elmigrintoj feliĉe pasigas sian maljunecon.

Sub la zorgado kaj edukado de la Partio, la elmigrintoj revenintaj al la patrolando kaj iliaj parencoj rapide progresas kaj energie konstruas sian novan hejmlokon. Jongheli-produktogrupoj de Nanjangbrigado de Duanfen-komunumo de la gubernio estas unu el la produktogrupoj kun plej multaj parencoj de elmigrintoj, kiuj konsistigas ĉirkaŭ 90% de ĝia loĝantaro. Disvolvante la revolucionan spiriton de penema luktado en malfaciloj, la parencoj de elmigrintoj aktive partoprenas en kolektiva laboro, ŝanĝis kampojn unurikoltajn en durikoltajn, kaj solan kulturon de rizo en la pasinteco. Ili kulturis

sukerkanojn kaj jutojn, plantis fruktarbojn sur digo kaj disvolvis diversajn flankokupajn produktadojn. Tial la produkta grupo akiris pliprodukton en sinsekvaj jaroj kaj paŝis en vicaron de avagardaj unuoj en la tuta komunumo en lernado de Daĝaj en agrikulturo. En 1971, la pomua grena produktokvanto de la produkta grupo atingis 615 kilogramojn, kaj ankaŭ la multflankaj entreprenoj ricevis disvolviĝon. La kolektiva akumulaĵo de la produkta grupo kaj enspezoj de la komunumanoj senĉese plimultiĝas.

Multaj ĉinaj elmigrintoj, kiuj forlasis la hejmlokon antaŭlonge, revenis al ĝi kaj estas profunde kortuŝitaj de la giganta ŝanĝo. Antaŭ nelonge, maljuna elmigrinto Lej Hjuevej revenis al la tage kaj nokte sopirata hejmloko — Ĝangliangbianbrigado de Dagiang-komunumo. Vidante, ke reto de kanaloj sin etendas vaste kaj rizkampoj viciĝas sur la riverbordo, kie en la pasinteco estis “vasta akvo dum tajdo kaj herbozaj marĉoj post tajdo”, kaj ke la mandarinarboj, liĉiarboj, bananarboj k. a. kreskas sur la digo, kie en la pasinteco kreskis neniuj herboj en printempo kaj haltis neniuj birdoj, li emocie diris: “Ja bona estas la socialisma patrolando! Bona estas la gvido de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ!”



Mateno sur la Suda Maro

Belaj Konkaj Bareliefaj

GENG HIANGJUN

NIA lando kun longa marbordo estas riĉa je maraj konkaj. Frue jam en Okcidenta Ĝou-dinastio en la 11-a jarcento a. K. aperis lakaj objektoj kun inkrustaĵoj el diverskoloraj konkaj. Kaj pli populariĝis metiartaĵoj ornamitaj per perlamoto de Han-dinastio. Sed kiel sendependa arto, la farado de bildoj el perlamotopecoj disvolviĝis nur en la lastaj dekelkaj jaroj post la Liberiĝo.

Konka bareliefo estas metiartaĵo farita el diverskoloraj delikataj skulptitaj kaj poluritaj perlamotoj

pecoj kune gluitaj laŭ la projektita desegno. Utiligante la apartajn kolorojn kaj rebrilojn de diversaj konkaj artistoj de konkaj bareliefoj faras siajn verkojn brilaj kaj buntaj konforme al la bezono de la projektitaj desegnaĵoj. Kaj por ĝuste prezenti iujn objektojn en konkaj bareliefoj, ili utiligas ankaŭ iujn naturajn formojn de konkaj. La konkaj bareliefaĵoj ĝenerale alprenas la stilon de ĉina pentraĵo en sia desegnado kaj aplikas skulptadon, kungluadon, alŝprucadon de koloroj kaj pentradon en sia formiĝo, tiel ke ĝi havas sian apartan stilon.

Konkaj bareliefoj estas produktataj en multaj lokoj de nia lando kiel ekzemple Kingdaŭ de Ŝandong, Dalian de Liaŭning, Bejhaj de Guanghi kaj ankaŭ Guangdong, Fugian, Ĝegiang kaj Giangsu. La produktaĵoj en diversaj lokoj havas sian apartan artan karakterizaĵon.

“Mateno sur la Suda Maro” farita de la Bejhaj-a Fabriko de Konkaj Bareliefoj (Guanghi) vive prezentas fiŝistinojn veturantajn al la Suda Maro por fiŝkapti kun pafilo sur la dorso kaj remiloj en la manoj vizaĝe al la matena suno. La verko modlis virinojn kiuj estas kaj lertaj fiŝkaptistinoj kaj bravaj milicaninoj. Firmaj kaj optimismaj, ili montras la apartan sentimenton de la fiŝistoj ĉe mara fronto.


La bildo “Bela Perspektivo” farita de la Dalian-a Fabriko de Konkaj Bareliefoj montras en dekoracia maniero la laboran scenon kaj feliĉan vivon de la nacimalplimultaj virinoj post la Liberiĝo. La figuroj montriĝas vivecaj kaj naturaj.

La bildo “Belaj Birdoj en Printempo” estas farita de la Kingdaŭ-a Fabriko de Konkaj Metiartaĵoj kun la tradicia temo de pavoj kaj peonioj kaj aranĝita laŭ ĉinstila pentraĵo en komponado. La verko plene utiligis la naturajn kolorojn kaj rebriolojn de la perlamoto por prezenti la interesan temon kiu konsistas el blue verdaj pavoj kiel ĉefaj figuroj

en kontrasto kun ruĝaj peonioj en nigra foliaro kiel fono. La bildeto “Frandaĵo en Nova Printempo” farita de la sama fabriko montras teloron da freŝaj salikokoj, kiu tre plaĉas al la rigardantoj pro siaj vivecaj figuroj en brilaj koloroj, impresanta kiel ĉinstila pentraĵo farita per lakonismaj penikstrekoj.



Laboristinoj de la Dalian-a Fabriko de Konkaj Bareliefoj de Liaŭning-provinco faras perlamotan metiartaĵon.



Frandaĵo en Nova Printempo


Ĝuang-a Brokato



Sakoj kun ĝuang-brokataj desegnoj

EN la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono de nia lando estas produktata la tre vaste ŝatata teksaĵo konata kiel ĝuanga brokato, kiu estas fortike kaj lerte teksita kun originala multkolora desegno riĉa je nacieca gusto. Ĝi

Veterana laboristino de la Trika Ĝuang-brokata Fabriko de Ginghi-gubernio de Guanghi instruas teknikon al juna laboristino.



estas grava materialo por fari vestojn kaj ornamatojn kaj servas kiel donacaĵo inter ĝuangoj.

Tiu brokato estas farita el diverskoloraj silkaj kaj kotonaj fadenoj. La kotonaj estas uzataj kiel varpo por formi ĝian fonkoloron, kaj la alikoloraj fadenoj el silko aŭ kotono estas uzataj kiel vefto por enteksi diversajn belajn desegnaĵojn, inter kiuj la ĝuangoj plej ŝatas tiujn de floroj, drakoj, feniksoj, leonoj, cervoj k.a.

La produkto de tiu bela metiartaĵo havas jam historion de pli ol 900 jaroj. Laŭdire, en Song-dinastio (960-1279) iu ĝuanga knabino nomata Koŭ Ĝu kiu estis lertø teksistino, la unua faris sep specojn de bunta teksaĵo kun desegnaĵo de krizantemoj k. a. Post tio tiu arto disvastiĝis inter la ĝuangaj laborulinoj kaj tiel naskiĝis la metiartaĵo nomata nun kiel ĝuanga brokato.


Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la teksado de ĝuanga brokato kiu antaŭe estis kiel flanka produkto, ricevis novan vivon kaj disvolviĝis kiel memstara produktobranĉo. Nun troviĝas kvar fabrikoj de ĝuanga brokato en la gubernioj Binĵang, Ginghi kaj Hinĉeng, kie dense loĝas ĝuangoj. En iuj popolaj komunumoj loĝkvartaloj kaj kamparaj estas organizitaj produktaj grupoj de ĝuanga brokato.

Kaj renovigoj estas efektivitaj en la tekniko sur la bazo de ĝia tradicia produktometodo. Ekz., la vefto antaŭe estis senŝanĝa en sola koloro, sed nun la metiistoj ŝanĝas la koloron de vefto konforme al la postuloj de la projekto tiel ke la brokitaj desegnaĵoj fariĝas pli delikataj kaj versimilaj.

Kaj ĝuangaj brokatoj kun malnovaj desegnoj longe ne plu aplikataj, kiaj “Du Pilkoludantaj Leonoj” kaj “Ĉiamverda Planto”, nun estas ree produktataj. Iuj fabrikoj de ĝuanga brokato havas sian desegno-projektan grupon por kolekti kaj plibonigi la tradiciajn desegnojn kaj krei la novajn. En la lastaj jaroj estas produktataj pli ol 80 varspecoj kun novaj desegnoj de “Pejzaĝo de Gujlin”, “Riĉa Rikolto de Kotonoj kaj Greno” k.a. Ekz., en surŝtofo por vatita litkovraĵo la metiistoj brokis per koloraj lanfadenoj 342 varikolorajn krizantemojn en reto formita el kunligitaj svastikoj. La floraĵo estas tre bela en komponado kaj koloroj. Sur mansako kun la desegno de “Karpoj kaj Lotuso” la metiistoj brokis vivece du karpojn naĝantajn ĉirkaŭ ruĝa lotuso plene floranta super akvosurfaco en spaco de 28 cm. Oni cetere kreis grandan brokatan pendaĵon, sur kiu estas bildo de “Intelektaj Junuloj al la Kamparo”. Ĝi trovas grandan ŝaton ĉe la publiko.

Antaŭe la varspecoj de la ĝuanga brokato limiĝis nur je malmultaj objektoj kiel surŝtofo de vatita litkovraĵo kaj tuko por dorse porti bebon. Nun ili plimultiĝis per pendbildo, tablotuko, fenestrokurteno, litkovrila surŝtofo, mansako, kapkusena tuko k. a.

Diversaj ĝuang-brokataj teksaĵoj



BONA RIKOLTO DE AGRIKULTURO

Malofta sekeco atakis nian nordan landon kaj iujn partojn en la sudo en la pasinta jaro; iuj lokoj eĉ suferis de inundo de pluvado, frosto, ventego, hajlo, kaj malutilaj insektoj. Tamen, sub la apogo de la ŝtato, sin apogante sur la kolektiva forto de popola komunumo, niaj vastaj kamparaj kadraroj kaj komunumanaj amasoj refoje gajnis bonan rikolton post batalado kun heroa spirito nepre venki la naturan katastrofon persiste daŭrigante irigaciajn entreprenojn. Laŭ unuapaŝa statistiko, la tuta produktokvanto de greno de la lando en la pasinta jaro atingis 240,000,000 tunojn, kiu egalas al tiu de la riĉrikolta jaro 1970. Kaj la produktokvantoj de kolzosemo, nekotonaj fibroplantoj, silk-raŭpa kokono, teo, sukeraj plantoj, tabako kaj fruktoj ĉiuj pliiĝis de 10% ĝis 40%. Krome kreskis la nombro de bredataj porkoj kaj plivastiĝis la areoj de forstokulturo en la tuta lando multe pli ol tiuj de la jaro 1971, kaj ankaŭ fiŝkaptado akiris riĉan rikolton.

CEMENTA INDUSTRIO EN BONA SITUACIO

Nia cementa industrio plenumis la ŝtatan planon de 1972 je 25 tagoj antaŭdate. Certgrade plialtiĝis ĝia kvalito kaj reduktiĝis la konsumo de krudaj materialoj, brulaĵoj kaj elektroenergio, tiel ke ankaŭ malleviĝis ĝia memkosto. La tuta cementa industrio nun troviĝas en bona situacio.

Disvolvante la spinan rolon de grandaj cementaj entreprenoj oni ankaŭ zorgis la malgrandajn por ilin plifirmigi kaj progresigi. Nun, 70 procentoj el la tutlandaj gubernioj starigis por si malgrandajn cementfabrikojn, kiuj produktis 48 procentojn el la totala produktokvanto de cemento de la tuta lando. La disvolviĝo de la malgranda cementa industrio liveris grandan kvanton da cemento al diversaj vilaĝoj, kio forte subtenis la kamparan akvo-utiligan konstruadon.



Nova Amikeco

Pompas sur la Antikva Vojo

HIN HUA

EN la lasta tempo, la Pekina Akrobata Trupo de Ĉinio faris viziton al okcidenta Azio kaj Afriko. Irano estis la unua lando de ĝi vizitita.


ĈIE REGIS PRINTEMPA VARMO

Kvankam la artaj senditoj de la ĉina popolo venis al Irano en malfrua aŭtuno, tamen ilian koron ĉiam varmigis ridanta vizaĝo, intima prizorgo kaj gastama akcepto de iranaj amikoj. En la 20-a de novembro, 1972, la akrobata grupo faris la unuan prezentadon en la stadiono Mohammad Reza Shah en Teherano. Kiam la akrobatoj eniris la halon, tondris manklakado de spektantoj. Tiam 70 iranaj knabinoj en blanka ĉemizo kaj griza jupo kuris al ili kaj prezentis al ili po bukedon. Iuj knabinoj eĉ salutis la ĉinajn akrobatojn per la ĵus lernita ĉina vorto.

La ĉinaj akrobatoj svingis florojn por saluti la spektantojn kaj poste ĵetis la florojn al ili. Multaj rigardantoj, kiuj ricevis florojn, tuj transdonis ilin al aliaj por kune ĝui la belan amikecon. En palpebruma momento la halo fariĝis bunta florgardeno. La ĉinaj akrobatoj komencis sian unuan prezentadon en la amika atmosfero.

Post la prezentado, generalo-leŭtenanto Hojjat Kashani, asistanto de la ĉefministro de Irano kaj estro de la Irana Fizikkultura Organizo, persone ascendis sur la scenejon por gratuli la ĉinajn akrobatojn pro sukceso de la prezentado kaj donacis al ili florkorbon. En tiu tempo la 70 iranaj knabinoj denove envenis kaj ekkantis iranan popolkanton akompanate de agrabla melodio, por montri siajn amikecon kaj varman gratulon al la akrobatoj. Post kiam foriris la spektantoj, ankoraŭ restis kelkaj iranaj junuloj ĉe la pordo de la stadiono, kun la ĵus

La geaktoroj salutas iranajn rigardantojn.





Membroj de la Pekina Akrobata Trupo de Ĉinio prezentas leonan dancon por iranaj spektatoroj.

ricevitaj floroj en la mano, kaj faris intiman babildon kun la ĉinaj akrobatoj. Iu okjara spektanto kaj la plej juna akrobato Ĝaŭ Janjan kantis respektive siajn amatajn kantojn. La sonoraj kantoj manifestis la amikecon inter la popoloj de Irano kaj Ĉinio.

TRADICIA AMIKECO INTER ĈINIO KAJ IRANO

La "Silka Vojo" antaŭ pli ol 2,000 jaroj iam akcelis ne nur komercon, sed ankaŭ kulturan interŝanĝon inter Irano kaj Ĉinio. Iuj magioj vaste konataj en Ĉinio, kiaj "Buŝo Elvomas Fajron", "Sin Ligi kaj Malligi", devenis de la antikva Persio. Post longa tempo disvolviĝis kaj altiĝis la akrobata arto de ambaŭ landoj. Nun, profitante tiun ŝancon la akrobatoj de la du landoj havas komunan deziron interŝanĝi sperton kaj arton de akrobato.

Vespere de la 19-a de novembro, kiam la ĉinaj akrobatoj faris provludon, iu 50-jara irana akrobato venis por rigardi kun siaj tri filinoj. Post la ludo lia 16-jara plejaĝa filino prezentis surferkablitan iradon. Tuj poste ŝi faris monocikladon sur la kablo. Ŝia lerta ludo ricevis aplaŭdon de la ĉinaj kolegoj de tempo al tempo. Lia 11-jara plej juna filino kaj la samaĝa Ĝaŭ Janjan kune rondiris sur monocikloj manon en mano. Tia spirito de reciprokaj lernado kaj helpo de la dulandaj akrobatoj estis laŭdata de la ĉeestantoj.

La "Leona Danco" ludata de la Pekina Akrobata Trupo estis bone akceptata de la iranaj spektantoj. Laŭ historia literaturo, antaŭ 1,900 jaroj senditoj de Irano jam transportis leonojn kaj aliajn

bestojn al Ĉinio tra la "Silka Vojo". La nomo de leono en la ĉina lingvo devenis de la persa lingvo. La nuna nacia flago de Irano surhavas bildon de leono en la mezo. Ekde Han-dinastio oni jam artismigis leonan figuron. Post artisma polurado de multaj jaroj "Leona Danco" fariĝis ŝatata tradicia programo vaste cirkulanta inter la ĉinaj popolamasoj. Nun tiu danco prezentiĝis antaŭ la iranaj spektantoj por plifortigi amikecon inter la popoloj de ambaŭ landoj. Ĉiufoje, kiam leonoj aperis sur la scenejo en forta kaj gaja tamburado kaj tamtamado, jen ruliĝante jen saltante, jen svingante la voston jen ludante silkpilkon, la halo estis ĉiam plena je gajeco. Iu irana spektanto diris: "Mi tre ŝatas la leonan dancon, ĉar ĝi jam fariĝis simbolo de amikeco inter la popoloj de Irano kaj Ĉinio."

EN LA ANTIKVA URBO

Fininte sian viziton en Teherano, la Pekina Akrobata Trupo venis al la dua granda urbo Isfahan de Irano, kiu estis konstruita antaŭ 3,000 jaroj kaj situas en meza Irano kaj sur la suda "Silka Vojo". Heider Taki, estro de la Fizikkultura Organizo de Isfahan, kaj aliaj personoj de la sporta rondo speciale veturis 15 km. for de la urbo por bonvenigi la akrobatan trupon. Je la intervidiĝo sinjoro Taki donacis bukedon al estro de la trupo Vang Hiaŭji kaj ĝoje diris: "Ni tre ĝojas, ke hodiaŭ ni bonvenigas la Pekinan Akrobatan Trupon de Ĉinio, post kiam ni antaŭ nelonge akceptis la Ĉinan Tablotenis Teamon." Trupestro Vang Hiaŭji diris: "Tio montras, ke ĉiam pli kreskas la kontaktoj kaj amikeco inter niaj du popoloj."

En la sekvanta tago D-ro Kiyampur, estro de Isfahan-provinco, akceptis la tutan trupon. Li diris, ke komerca rilato kaj kultura interŝanĝo inter la popoloj de Irano kaj Ĉinio ekzistis iam en la historio, tial niaj du landoj havas multajn similaĵojn. Ekz., en la ĉina kaj persa lingvoj sin trovas 270 analogaj vortoj en prononco. La arto de subtilstrekaj pentraĵoj sur iuj konstruaĵoj de Irano estis deveninta de Ĉinio. Vang Hiaŭji diris, ke iuj programeroj el la ĉinaj akrobataĵoj devenis de Irano. Li ankoraŭ laŭdis la apartan stilon de multaj antikvaj konstruaĵoj de Isfahan. La provincestro demandis: "Ĉu vi povas paroli en la persa lingvo?" Trupestro Vang respondis: "Ni ĵus lernis kelkajn vortojn, ekzemple, 'salam' (saluton)." La provincestro ĝoje diris: "Bone, vi lernas ĝin komence de la plej bela vorto, kiu simbolas amikecon."

En la 28-a de novembro, akompanate de iu maljuna arkitektura profesoro, la akrobata trupo vizitis multajn famkonatajn antikvajn konstruaĵojn de la urbo. Tiu profesoro bone konis la tradicion rilaton inter Irano kaj Ĉinio. Li diris: "Ĉinio kaj Irano ambaŭ havas siajn historiojn de kelkmil jaroj. Niaj du landoj ĉiam vivas en paco kaj amika rilato. Nun pli kaj pli profundigas la amikeco inter la du popoloj." La profesoro kun grizaj haroj ĉe la tempioj parolis humure, li gvidis la trupon ascendi la konstruaĵon en formo de antikva turo altan je 28 metroj laŭ la spirala ŝtuparo. Nun, tiu antikva konstruaĵo jam fariĝis unu el la vidindaj lokoj de Irano. En la pasinta jaro la ĉinaj delegacioj, kiuj vizitis Iranon, ascendis tiun konstruaĵon por rigardi la belan pejzaĝon de Isfahan. La alveno

de la akrobata trupo aldonis novan paĝon en la historio de amikeco inter Irano kaj Ĉinio.

BEDAŬRA ADIAŬO

Rapide forpasis du semajnoj. En la 1-a de decembro, la Pekina Akrobata Trupo de Ĉinio devis adiaŭi iranajn amikojn kaj veturi al Alĝerio. Antaŭ la adiaŭo multaj iranaj amikoj esprimis siajn bondezirojn al la ĉinaj amikoj per diversaj manieroj. Iu kelnero de la hotelo speciale aĉetis pistakon kiel donacaĵon al la ĉinaj akrobatoj, dirante: "Mi ne havas valoraĵon por donaci al vi. Mi montras mian korsenton per pistako, la aparta produktaĵo de Irano!" La irana lernantino de baledo, kiu funkciis kiel anoncistino de la akrobata trupo en Teherano, starigis profundan amikecon kun la ĉinaj akrobatoj en kelktaga kontaktado. Ŝi lernis multajn ĉinajn vorton, kiaj "saluton", "ĝis revido", "kiel vi fartas?", "amikeco". La ĉinaj akrobatoj ankaŭ lernis de ŝi la persan lingvon. Antaŭ la veturo de la akrobata trupo de Teherano al Isfahan, ŝi kaj ŝia patrino venis al la trupo por fari adiaŭon. Post tri tagoj, kiam la trupo revenis al Teherano, ŝi denove intervidiĝis kun la ĉinaj akrobatoj kiel malnovaj amikoj longe disigitaj. Kiam la trupo estis forlasanta Iranon, ŝi kaj ŝia patrino venis al la aerodromo kaj donacis siajn fotojn al ĉinaj akrobatinoj. Kun larmoj ili brakumis la lastajn dirante: "Ni sincere ne volas lasi vin foriri!"

La tradicia amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Irano formita dum miloj da jaroj certe floras pli pompe!



Rigardantoj de Teherano varme manpremas kun ĉinaj geaktoroj.

Nova Fizionomio de Jangzi-rivero



Jiĉang-haveno en nokto

Jangzi, la plej granda rivero de Ĉinio, longas 5,800 kilometrojn kaj havas multajn branĉojn kaj lagojn, kaj la totala longeco de la navigebla akvovojo atingis 18,000 kilometrojn. Triono de la loĝantaro de nia lando vivas en ĝia baseno, kies agrikulturaj produktaĵoj okupas du kvinonojn de la totala produktokvanto de la tuta lando kaj tie koncentriĝas rimarkinda nombro da industriaj bazoj.

Sed, antaŭ la Liberiĝo, sub la reacia regado de la kuomintanga registaro, la ekonomia aorto de la gravaj urboj apud la rivero estis tenata en la manoj de imperiistoj. Ili superregis doganejon, monopoligis surakvan transportadon, dumpingis grandan kvanton da superfluaĵaj varoj kaj prirabis niajn riĉfontojn.


En la jaro 1949, Jangzi-rivero revenis al la popolo. De tiam, la rivero pli kaj pli manifestis sian gravecon en nia nacia ekonomia vivo.

Post la Liberiĝo, oni jam ordigis 145 danĝerajn malprofundaĵojn sur la naviga vojo de la fame konataj danĝeraj "Tri Montogorĝoj", tiel ke ĝi fariĝis pli sekura. Ankaŭ la havenoj kaj dokoj laŭlonge de la rivero estis konstruitaj kaj disvastigitaj kaj iom post iom efektiviĝis mekanikigon en ŝarĝado kaj malŝarĝado. La tonelaro de ĝiaj ŝipoj kreskis je 7-oblo, la transportaj kvantoj de pasaĝeroj kaj varoj respektive je 10-oblo kaj 14-oblo, kaj la ŝarĝa kaj malŝarĝa kapablo de la havenoj je 11-oblo, kompare kun tiuj de la komenca periodo post la Liberiĝo.




Varŝipoj trapasas Hiling-gorĝon, unu el la danĝeraj "Tri Montogorĝoj" de Jangzi-rivero.






Navigvoĵaj laboristoj patrolas tagnokte sur la rivero por servi al la navigado de la ŝipoj.



Ŝiparo plenŝarĝita de petrolo



Ĵo sur pasaĝera ŝipo





Juna veturigistino de akumulatora transportilo



Ĉinstilaj Pentraĵoj

漓江春色 三月 雪后 画







Kanalo Ruĝa Flago

de la Pekina Pentra Akademio

La Rumana Popola Kantodanca Ensemblo “Banatul” en Ĉinio

LA Rumana Popola Kantodanca Ensemblo “Banatul” veninta de la piedo de Karpatoj kaj bordo de Danubo prezentis en Pekino popolajn tradiciajn kantojn kaj dancojn, kiuj vivece montris ke la riĉa rumana arto apartenas al ĝia laborema kaj brava popolo. La prezentitaj programeroj plejparte estas popolaj artaj verkoj longe cirkulantaj en diversaj naciecoj, tial ili riĉas je lokaj koloroj. Ekz., la danco “Calusar de Montania” estas kamparana danco kun longa historio. Dum printempa semado, kamparanoj ofte dancas tiun dancon por esprimi sian ĝojon antaŭ plugado kaj memfidon pri riĉa rikolto en aŭtuno, kio montras senliman kreivon de la rumana laboranta popolo.

Krome ni spektis ankaŭ multajn muzikaĵojn kun la rumana stilo. Ĉu oreplaĉaj kaj sentimentaj popolaj kantoj aŭ instrumentaj muzikaĵoj kun klara ritmo ĉiuj spegulas la vivon kaj batalon de la lokaj popoloj dum longa tempo.

La prezentado de la ensemblo “Banatul” plupaŝe vidigis al ni, ke la rumana popolo havas revolucionan tradicion rezisti kontraŭ agresado de fremdaj landoj, memfidas pri la forto de sia nacio kaj defendas sian nacian dignecon jam de antikveco. La kantodanco “Ana Lugoĵana” adaptita laŭ la samnoma muzikaĵo estas dediĉita al la virinoj en batalo. La danco kun nomo de knabino kaj loka nomo kiel familia nomo estas simbolo de laborantaj viri-

Danco: Ana Lugoĵana





Vira solo: Kanto de Maramures

noj, tial la verko esprimas la penson kaj sentimenton de la popolo. Ĝiaj korverŝa sentimento, rapida turniĝa dancmovo, emocia muziko kaj kortuŝa kantoteksto teksis bolantan scenon plenan de vigeleco. Ĝi estis adaptata de la komponisto en la tempo, kiam la Aŭstria-Hungara Imperio regis Rumanion kaj detranĉis tiun lokon de la Rumana Duklando. Per aluda maniero li esprimis la noblan idealon de la rumana popolo varme ami liberecon kaj aspiri lumon.

Rumanio, lando kun longtempa kulturo, delonge jam havas relative progresintan popolan arton. Post la liberiĝo, ĝia partio kaj popola registaro donis grandan atenton al la riĉiĝo kaj disvolvo de la popola arto. La ensemblo estas profesia popola kantodanca ensemblo de Banatul-gubernio. Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj post la fondiĝo de la ensemblo, ĝiaj artistoj diligente reformis, plibonigis kaj prezentis la tradiciajn programerojn, al kiuj ili donis novan vivon por ke tiuj servu al la arda aktuala batalo de Rumanio. La ensemblo faris pli ol 5,000 prezentojn en- kaj ekster-lande kaj ricevis varman bonvenigon de la rigardantoj.

Tre kortuŝe estas ke la ensemblo "Banatul" ĉifoje venis al Ĉinio nur kun 20 membroj. Tamen, sin dediĉante al la kultura interŝanĝo inter la popolanoj de Ĉinio kaj Rumanio, ili estas rigoraj al si tiel en penso kiel en arto. Ĝia estro kamarado Stan Gelu Mircea ne nur respondecas pri la gvida laboro kaj arta direktado de la tuta ensemblo, sed ankaŭ persone prezentas solon, ludas violonon kaj

direktas la orkestron sur scenejo. La diligenta laborstilo kaj malgrandeco de la organizo estas necesaj por disvolvi kaj prosperigi la novan socialisman popolan arton.

Dum la longtempa revolucia batalado, la popoloj de Ĉinio kaj Rumanio starigis inter si profundan amikecon. Kaj en la lastaj jaroj, tia amikeco akiris novan disvolviĝon. Ni vidis kun ĝojo, ke la Rumana Popola Kantodanca Ensemblo "Banatul" irigaciis la amikecan floron de la dulandaj popolanoj per sia prezentado en Ĉinio. Kun kia emocio la fame konata solistino Ana Pakatius kantis ĉinan kanton pri Prezidanto Maŭ per la ĉina lingvo! Jam delonge ŝi deziris ellerni ĉinan kanton en la ĉina lingvo, por esprimi la sinceran amikecon de la rumana popolo al la ĉina. Ĉifoje, apenaŭ ŝi atingis Ĉinion vespere, ŝi tuj petis helpon de ĉinaj kamaradoj, kaj en tiu vespero ŝi jam ellernis kanti la ĉinan kanton "Vivu Prezidanto Maŭ!" en la ĉina lingvo. Kiam ni aŭskultis ŝian kantadon en profunda amo al Prezidanto Maŭ, ankaŭ ni nedeteneble elkore deziris al kamarado Nicolae Ceausescu, la gvidanto de la rumana popolo, bonan sanon kaj longan vivon.

La Rumana Popola Kantodanca Ensemblo "Banatul" prezentis ankaŭ en Vuhan, Ĝengĝou kaj aliaj lokoj. Krom prezentado, ili ankaŭ vizitis fabrikojn, la Tutlandan Ekspozicion de Metiartaĵoj, literaturajn kaj artajn trupojn kaj antikvajn vidindaĵojn. Ĉie kien ili alvenis, ili ricevis varmegan bonvenigon de niaj popolanoj.

Vasta Unuiĝo de la Landoj de la Tria Mondo

EN la hodiaŭa mondo, neniu ajn grava internacia problemo estas decidebla sen partopreno de la landoj de la tria mondo kaj sen aŭskulto de iliaj voĉoj. La landoj de la tria mondo jam fariĝis grava forto en la hodiaŭa mondo. La tiranado kaj subpremado fare de la du superpotencoj al la malfortaj landoj fariĝis ĉiam pli malfacile praktikeblaj.

La landoj de la tria mondo vaste kunagas, pligas sian unuiĝon, interhelpas, firme oponas kontraŭ la politikoj de agreso, ekspansio kaj militado kondukataj de la superpotencoj, disvolvas bataladon por defendi la sendependecon de sia lando kaj protekti la rajtojn de sia nacio, kaj ludas ĉiam pli aktivan rolon en la internaciaj aferoj.

REZISTO KONTRAŬ AGRESO KAJ OPO- NADO KONTRAŬ SUPERREGO

Kie estas agreso kaj subpremo, tie ankaŭ estas kontraŭstaro. La armita batalo de la aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj senĉese akiras venkojn kaj pli kaj pli multaj landoj faris senlacan bataladon kontraŭ la agreso, subfosado, interveno kaj superrego de la superpotencoj.

En Hindoĉinio, la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio gajnis brilajn venkojn per bravaj kaj obstinaj sinsekvaj ofensivoj kaj donis pezan baton al la plano de la usona imperiismo pri "vjetnamigo" de la milito. Usono prokrastas subskribon sur la interkonsento pri fino de la milito kaj restarigo de paco en Vjetnamio, longigas la agresan militon kaj pliintensigas sian transportadon de armiloj al la pupa regpotenco de Nguyen Van Thieu. Samtempe kun la pliintensigo de la milito en suda Vjetnamio, la usona registaro senskrupule reko-

mencis frenezan bombadon al la norda parto de Vjetnamio inkluzive de Hanojo kaj Haiphong, kun la vana intenco devigi la vjetnaman popolon solvi la vjetnaman problemon laŭ la absurdaj kondiĉoj elmetitaj de Usono. La artifiko de la usona registaro devigi la vjetnaman popolon obeeme iri al pacigo per bombado delonge jam pruviĝis nerealigebla. La armeo kaj popolo de norda Vjetnamio streĉe kunbatalis kaj donis al la usonaj agresantoj meritatan punon. En Kamboĝo, la Naciliberigaj Popolaj Armitaj Fortoj grandnombre ekstermis malamikojn en ĉiuj batalejoj tra la tuta lando, kaj nun la areo de la liberigita regiono de Kamboĝo jam okupas 85 procentojn de la tuta areo de la lando kaj la loĝantaro en ĝi nombriĝas pli ol kvin milionoj. La patriotaj armeo kaj popolo de Laoso brave batalas kaj senĉese akiras novajn venkojn. En Mezoriento, la palestina popolo kaj la aliaj arabaj popoloj nun plifortigas sian unuiĝon por oponi kontraŭ la izraelaj agresantoj. La armeoj de Libano kaj Sirio kaj la gerilaj taĉmentoj de Palestino daŭre repuŝis la izraelajn trupojn invadantajn en Libanon kaj Sirion. En septembro de 1972, la membroŝtatoj de la Konsilantaro de la Araba Ligo unuanime kondamnis la agresan krimon de Izraelo kaj esprimis sian volon liberigi la okupitan teron per siaj propraj fortoj. En aprilo, Tanzanio en Afriko frakasis la agresan intrigon de la portugalaj koloniistoj. Plue disvolviĝas la armita batalo de la popoloj de Mozambiko, Angolo, Gvineo (Bissau) k.a. por naciliberigo. Pli kaj pli boniĝas la situacio de la armita batalo en la tuta Afriko kontraŭ imperiismo kaj koloniismo.

La intrigo de la superpotencoj por superregi kaj interveni landojn de Azio, Afriko kaj Latinameriko ricevis novan malvenkon. Disvolviĝas la

batalo de la popoloj de la arabaj landoj kontraŭ la superpotencoj pro ilia subteno al la izraelaj agresantoj kaj fabrikado de situacio “nek milita nek paca” en Mezoriento. En 1972, la registaro kaj popolo de Panamio disvolvis potencon movadon, forte postulante restarigon de la suvereneco super la kanala zono longe okupata de la usona imperiismo, retiriĝon de la usonaj trupoj el Panamio kaj abolon de la neegala traktato subskribita de Usono kaj Panamio en 1903. La landoj sur la bordoj de la Hinda Oceano kaj Mediteraneo forte oponas kontraŭ la konkurado inter la superpotencoj Usono kaj Sovetunio por hegemonio super tiuj akvoĵoj. Sinjorino S. Bandaranaike, ĉefministriĉino de Sri-lankao, montris ke la senbrida veturado de usonaj kaj sovetuniaj militaj flotoj malebligas al la Hinda Oceano fariĝi paca regiono. Ŝia propono deklari la Hindan Oceanon kiel pacan regionon ricevis subtenon de multaj landoj. Malajzio, Singaporo kaj Indonezio deklaris, ke ili kune administros aferojn pri la markolo Malako kaj la Singapora Markolo kaj oponas kontraŭ la intrigo de la superpotencoj “internaciigi” la markolon Malako por defendi la suverenecon kaj interesojn de la landoj ĉe ili. La registaroj de Alĝerio, Libio, Tunisio kaj Maroko kaj aliaj unuanime pledas, ke Mediteraneo estu “Maro de Paco”, oponas kontraŭ starigo de fremdlandaj militaj bazoj, kaj postulas, ke la usonaj kaj sovetuniaj militaj flotoj retiriĝu el ĝi.

POR NACIAJ INTERESAJ KONTRAŬ EKONOMIAJ PRIRABOJ

De la jaro 1972, pli kaj pli multaj landoj de la tria mondo ŝtatigis entreprenojn de fremdlanda monopola kapitalo, por forskui la superregadon de la imperiismo kaj defendi la naciajn interesojn. Ĉilio konfiskis la tutan posedaĵon de la Internacia Telefono kaj Telegrafo de usona kapitalo en Ĉilio kaj deklaris ŝtatigi bankon kaj multajn aliajn entreprenojn de usona kapitalo. Meksikio, Peruo, Panamio kaj Venezuelo ŝtatigis aŭ metis sub registaran kontrolon nombron da entreprenoj de usona kapitalo. Kaj multaj latinamerikaj ŝtatoj unuigis por rebati venĝajn aranĝojn de la usona imperiismo.

Profunde disvolviĝas la batalo de la marbordaj landoj por defendi sian fiŝkaptadon kaj marajn riĉfontojn. Nun naŭ el la latinamerikaj landoj jam deklaris maran teritorian rajton de ducent maraj mejloj kaj ankaŭ Siera-Leono de Afriko faris la samon. Kaj multaj aliaj landoj en Azio kaj Afriko difinis maran teritorion de 18 ĝis 130 maraj mejloj. Por defendi sian maran teritorion, la supre menciitaj latinamerikaj landoj senĉese kaptis kaj punis

usonajn fiŝkaptajn ŝipojn, kiuj entrudis en iliajn marajn teritoriojn. En junio de 1972, 15 karibaj landoj okazigis specialan kunvenon pri maraj problemoj. La partoprenantoj de tiu kunveno rifuzis la peton de Usono por ĝin ĉeesti kiel “observanto”. La kunveno adoptis la Deklaron de San-Domingo kaj denove asertis sian starpunkton pri la mara rajto de ducent maraj mejloj. La Dua Kunveno de la Marfunda Komisiono de la Unuiĝintaj Nacioj okazigita en julio de 1972, la delegitoj de Sovetunio kaj Usono publike oponis kontraŭ la rajto de marbordaj landoj difini la limon de sia teritoria maro, insistis, ke la maksimuma larĝeco de teritoria maro ne devas superi 12 marajn mejlojn, kaj absurde postulis la rajton, ke iliaj militaj ŝipoj povas “libere trapasi” la markolojn apartenantajn al la marbordaj landoj. Sovetunia delegito eĉ publike deklaris, ke ĝi konsentos al la rajto de la landoj dividi inter si la interesojn gajnatajn per ekspluatado de marfundaj riĉfontoj, nur se oni ĝin kontentigos je tiuj kondiĉoj. Tiuj asertoj de politiko de forto elmetitaj de la du tiranoj Sovetunio kaj Usono estis forte refutitaj de delegitoj de landoj de la tria mondo. Je la fino, la kunveno adoptis la liston pri marleĝaj problemoj elmetitaj de Alĝerio kaj aliaj 55 landoj kiel programon por diskutado pri maraj leĝoj.

En la tria sesio de la Konferenco pri Komerco kaj Disvolviĝo de la Unuiĝintaj Nacioj, okazigita en aprilo de 1972, ŝtatoj de la tria mondo forte oponis kontraŭ la prirabado de imperiismo, firme postulis nuligi malegalan komercan sistemon, rompi la regadon kaj monopoligon de imperiismaj landoj al la internacia merkato, reformi la internacian valutatan sistemon kaj disvolvi la nacian ekonomion kaj navigan aferon ktp. La tri proponoj pri principoj de internaciaj komercaj rilatoj kaj politikoj adoptitaj de la konferenco respegulis la fortan postulon de la disvolviĝantaj landoj por defendo de sia suvereneco kaj naciaj interesoj. Dum voĉdonado de la tri proponoj, la usona delegito dufoje voĉdonis per “kontraŭ” kaj unufoje sindetenis; la sovetunia delegito unufoje sindetenis kaj dufoje ne partoprenis voĉdonadon. Tio montris, ke la du hegemoniaj potencoj estas tre izolitaj. En oktobro de 1972, la landoj kaj regionoj de la Kariba Maro decidis starigi komunan merkaton antaŭ majo de 1973 por kunlabori en disvolvo de nacia ekonomio.

La landoj, kiuj eksportas petrolon, kafon, kakaon, kupran mineralon k. a. materialojn, sinsekve akiris novajn sukcesojn lastjare en la batalo kontraŭ la ekonomia prirabado de imperiismo. En

la komenco de la jaro 1972, ses mezorientaj landoj eksportantaj petrolon refoje disvolvis kunan bataladon, devigis petrolajn kompaniojn de Usono kaj aliaj okcidentaj landoj konsenti kompensi la perdon de tiuj landoj pro devaluto de la usona dolaro. En aŭgusto, 20 latinamerikaj landoj decidis fondi komunan merkaton de movfortoj kaj rekte fari petrolan komercon, ke fremdlandaj petrolaj kompanioj ne povas profiti el tio. La plejparto de la landoj produktantaj kafon kaj kakaon estas disvolviĝantaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. En pluraj kunvenoj de 1972, ili faris intensan batalon kontraŭ la konsumaj landoj kun Usono kiel la ĉefo, ĉirkaŭ la problemo por kaj kontraŭ prezomalaltigo kaj fiaskigis la usonan intencon de prezomalaltigo. La kafoproduktaj landoj unufoje rompis la monopoligon kaj minacon de Usono, decideme altigis la eksportan prezon de kafo kaj forte batis la hegemonian pozicion de Usono en la internacia organizo de kafo. Tiuj faktoj montras, ke la disvolviĝantaj landoj povas efektiviĝi sian justan postulon paŝon post paŝo, se nur ili unuiĝas kaj persistas en batalado.

UNUIĜO KAJ INTERHELPO

En traktado de multaj problemoj, la landoj de la tria mondo pli forte unuiĝas, kunagas unuanime, interhelpas kaj kuraĝigas reciproke en malsamaj formoj kaj malsamaj sferoj. Tio estas grava faktoro por ilia senĉesa akiro de venkoj en la batalo kontraŭ la hegemoniaj potencoj.

En Latinameriko, post kiam Ĉilio restarigis la diplomatan rilaton kun Kubo en 1970, Peruo rompis la punan aranĝon de Usono kontraŭ Kubo kaj restarigis siajn diplomaciajn rilatojn kun Kubo en julio de 1972. Ankaŭ Gvajnio, Jamaiko kaj aliaj du karibaj landoj unu post alia restarigis la diplomaciajn rilatojn kun Kubo en decembro de 1972. Pro persista batalado de afrikaj kaj aliaj popoloj, en aŭgusto de tiu sama jaro la Internacia Olimpika Komitato decidis nuligi sian inviton al Rodezio por partopreno de la 20-a Olimpiko. Tio estas nova venko akirita de afrikaj landoj en sia batalo de unuiĝo kontraŭ nova kaj malnova koloniismo.

En iuj internaciaj kunvenoj, la landoj de la vasta tria mondo subtenas unu alian kaj firme oponas kontraŭ la agreso kaj subpremo de imperiismo. En la speciala konferenco de la Sekureca Konsilantaro de UN okazigita en Afriko en januaro de 1972, multaj aziaj kaj afrikaj landoj forte kondamnis la blankulajn rasismajn reĝimojn de Rodezio kaj la Suda Afriko pro ilia barbara subpremo al la lokaj popoloj, kondamnis la koloniisman militon kondukatan de Portugalio en Afriko kaj esprimis firman subtenon al la liberiga movado de Afriko. La naŭa sesio de ĉefoj de la Afrika Unueca Organizo okazigita en junio de 1972 refoje esprimis sian subtenon al la armita batalo de la popoloj de Zimbabveo, Angolo, Mozambiko, Gvineo (Bissau) kaj Namibio, kaj decidis plifortigi la helpon al ili. Ankaŭ la oka konferenco de ŝtatestroj kaj registaraj estroj de Orienta kaj Meza Afriko faris decidon pli fortigi la helpon al la liberiga movado de la diversaj regionoj de Afriko. La Konferenco de Ministroj de Eksteraj Aferoj de Nealiancigitaj Landoj, okazigita en Georgetown de Gvajanio esprimis solidarecon kaj subtenon al la kontraŭagresa batalo de la popoloj de Hinduĉinio, Palestino, Arabio, Azio, Afriko kaj Latinameriko; la konferenco montris, ke la landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko devas kunagadi, kaj plifortigi sian unuiĝon kaj kunlaboron en internacia sfero. La konferenco ankaŭ decidis ke la delegacio de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo ĉeestu la konferencon kiel la sola leĝa reprezentanto de Kamboĝo kaj la delegacio de la Provizora Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio ĝin ĉeestu kiel oficiala membro, tio estas subteno kaj kuraĝigo al la popoloj de Kamboĝo kaj suda Vjetnamio en la naciŝava batalo kontraŭ la usona imperiismo. En la ĝenerala debato de la 27-a Kongreso de UN reprezentantoj de multaj mezgrandaj kaj malgrandaj landoj ĝenerale kondamnis la hegemonion de la du superpotencoj kaj subtenis la naciliberigan movadon de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Tiuj justaj voĉoj kontraŭ agreso, interveno kaj subpremo respregulis la vekigon de la tutmonda popolo kaj la aktualan politikan tendencon de la mondo.





“KURAC-ŜTRUMPO”

Speco de speciala ŝtrumpo havanta kuracan efikon estas produktita de la Jan-an-a Ŝtrumpo-fabriko en Ŝanhajo. Tia ŝtrumpo estas farita el nilonaj kaj kaŭĉukaj fadenoj. La surmeto de tiaj ŝtrumpoj produktas relative grandan premon al la loko de variko por akceli la cirkuladon de sango. Tio helpas kunefike al kuracado de la malsano embolozo.

300-TUNA ŜARĜAŬTO

Jam estas liverita al uzado la unua 300-tuna ŝarĝaŭto, mem projektita kaj konstruita en nia lando.

Post ĝia finkonstruo en Ŝanhajo en lasta septembro, oni multflanke provis ĝin, inkluzive provon de superŝarĝo, dum kiu ĝi startis de iom kota grundo ŝarĝita per 76 ŝtalaj ingotoj pezantaj kune 322 tunojn, iris malrapide post turniĝo en mallonga radio, kaj estis provita per retroiro kaj levo-mallevo per olea pumpilo. La funkcio estis tute normala. Laŭ la ekspertizo de koncernaj institutoj ĝia kvalito estas bona kaj konforma al la postuloj de la projekto.

RONDIRA PREZENTADO

La Ĉina Baleda Trupo, la Centra Muzika Ensemblo kaj la Pekina Pekin-opera Trupo ĉiuj faris aparte rondiran prezentadon en diversaj lokoj. Dum pli ol unu monato, tiuj tri trupoj faris 61 prezentojn en Hi-an kaj Jan-an de Ŝenhi-provinco, Taj-juan kaj Daĝaj de Ŝenhi-provinco, Ginan de Ŝandong-provinco, Hefej de Anhuj-provinco, Daking kaj Harbino de Hejlonggiang-provinco kaj Ŝenjang de Liaŭning-provinco. Iliaj rigardantoj superis cent mil. Cetere ili iris al laborejoj, vilaĝoj, kazernoj kaj faris tie prezentojn por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Iliaj

prezentoj, inkluzive la revolucion modernan baledon *Ruĝa Virina Taĉmento*, simfonion *Ŝagiabang*, la fortepianan koncêrton *La Flava Rivero*, la revolucion modernan pekinoperon *Ŝagiabang*, ricevis varmajn aplaŭdojn de la vastaj amasoj.

EKZAMENO PRI NAĜADO DE INFANOJ

En decembro de 1972, la Ŝtata Fizikkultura Komisiono faris en Pekino ekzamenon pri naĝado de infanoj, kiun partoprenis infanaj naĝsportistoj el Ŝanhajo, Guangdong. Hejlonggiang, Tiangin kaj Pekino. Inter la 150 infanoj la plejaĝa estis 12-jara dum malplejaĝa 9-jara. Ili estis dividitaj laŭ la aĝo en la grupoj A kaj B. Estis entute 12 ekzamenitaj disciplinoj en naĝmanieroj: brustonago, dorsonago, papilnago, libera nago, miksnago kaj stafetnago en distancoj de 50, 100, 200 kaj 400 metroj. Plenaj de vikleco, la sportistetoj lernis unu de alia kaj kuraĝigis reciproke en la ekzameno kaj plejparto el ili rompis sian rekordon.

FABRIKADO KAJ DISVASTIGO DE RIZKAMPAJ MAŜINOJ

En nia lando la rizplantoj okupas ĉ. trionon de la totala kulturareo de grenaj plantoj. En Giangsu, Ĝegiang, Anhuj, Gianghi, Fugian, Hunan, Hubej, Guangdong, Siĉuan, Junnan, Gujĝoŭ, Ŝanhajo kaj Guanghi, kie produktiĝas rizo, oni nun fabrikas kaj disvastigas laŭ malsamaj kondiĉoj de la koncernaj lokoj diversajn agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn en drenado, irigacio, plugado, plantprotekto, degrajningo kaj transportado. Pli ol 50% de rizdraŝado en multaj lokoj estas farataj maŝine aŭ duonmaŝine. La riztransplantaj maŝinoj estas uzataj pli kaj pli vaste. Kaj rizrikoltaj maŝinoj estas prove uzataj en iuj lokoj de Guangdong, Ŝanhajo kaj Giangsu. La scienca esplorado pri mekanikigo de rizkampaj laboroj estas nun plue intensigata.

Ili Estas Samfamilianoj

HIANGHONG-maŝinfabriko troviĝas en la pola komunumo Nianggia de Hunan-provinco. La laboristoj kaj komunumanoj intime interrilatiĝas kaj helpas unu alian kiel samfamilianoj.

Kiel naskiĝis kaj disvolviĝis la amikeco inter la du najbaroj?

UNUIĜO

En 1968, kiam Hianghong-maŝinfabriko konstruis pliajn fabrikdomojn, kelkaj fruktaroj de iu produkta grupo estis damaĝitaj, kaj pro tio ĝiaj komunumanoj estis malkontentaj. Informiĝinte pri tio, la partia komitato de la fabriko faris enketadon kaj ĝia gvidanta kamarado persone venis al la dirita produkta grupo por peti pardonon kaj kompensis la perdon. Tiel la problemo estis solvita.

Nelonge post tio, okazis la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, en kiu Prezidanto Maŭ elmetis la alvokon “**unuiĝu por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn**”.

La kadroj de la fabriko kaj la komunumo estis multe inspiritaj en lernado de la alvoko de Prezidanto Maŭ, en ligo kun la okazintaĵoj. En kunveno de la oficistoj kaj laboristoj de la fabriko iu gvidanta kamarado diris: Agrikulturo estas la bazo de la nacia ekonomio. Ni laboristoj, plejparte venintaj el kamparo, devas ĉiam zorgi pri subteno kaj disvolvo de la agrikultura produkto. Tial damaĝi fruktarojn de la produkta grupo estas grava demando koncernanta fortigon kaj firmigon de la alianco inter laboristoj kaj kamparanoj. Tio montris, ke al nia cerbo mankis la linio de unuiĝo kaj venko. Samtempe kun tio ankaŭ la kadroj de la

komunumo kaj produktaj brigadoj komprenis: Laboristoj kaj kamparanoj estas samfamilianoj kaj la kamparanoj devas subteni socialisman industriaran konstruadon.

Post tio intimiĝis la rilatoj inter la fabriko kaj la produktaj brigadoj en ĝia ĉirkaŭaĵo.

Foje, la fabriko decidis konstrui ŝoseon. En la komenco, la kamaradoj sin okupantaj pri la projektado konsideris nur malpliigon de konstruaj laboroj kaj decidis ke la ŝoseo trapasu multajn rizkampojn. Dum diskutado pri la plano, laboristoj elmetis kritikajn opiniojn. Iu maljuna laboristo diris: “Tiu ŝoseo okupos 3.4 hektarojn da fekunda tero kaj kaŭzos malpliigon de grenprodukto, malutile al la ŝtato kaj al la produkta grupo.” Poste oni ellaboris novan planon, laŭ kiu la ŝoseo okupos nur unu hektaron da agro. La gvidantoj de la fabriko persone esploris la lokon por fari lastan decidon kaj trovis, ke la ŝoseo okupos nur kvin muojn da agro, se oni konstruos ĝin tra deklivo de monteto. Kompreneble, la konstrua laboro estos pli granda kaj peniga. Ili reviziis la projekton. Dum la konstruado, la laboristoj kreis novan akvokampon sur sablejo per elfosita tero, por kompensi la perditan kampon de la produkta grupo.

La komunumanoj estis tre kortuŝitaj, vidinte ke la gvidantoj kaj laboristoj de la fabriko tiel zorgas pri iliaj produktado kaj intereso, kaj ili nomis la nove kreitan rizkampon “kampo de solidareco”.


RECIPROKA SUBTENADO

Direktate de la linio de unuiĝo kaj venko, la laboristoj kaj la komunumanoj senĉese montris solidarecon inter si per reciproka subtenado.

Dum la lasta somero longtempe ne pluvis en la provinco Hunan. La popola komunumo Nianggia trafis seriozan trosekecon. Laŭ instrukcio de la provinca partikomitato Hianghong-maŝinfabriko tuj fondis gvidan grupon por subteni agrikulturon. Kune kun kadroj kaj membroj de la komunumo kaj ĝiaj produktaj brigadoj, gvidantoj de la fabriko kun oficistoj kaj laboristoj sub sia gvido plurfoje venis al kampoj por observi la trosekecon kaj trovi rimedojn kontraŭ la natura katastrofo. La kampoj de du produktaj grupoj de Gianhin-brigado estas sur montdeklivoj, kie la lagetoj kaj putoj jam sekigis, kaj la mezrikoltaj rizplantoj estis tuj mortontaj, dum la malfrurikoltaj rizplantoj ne povis esti transplantotaj. Vidinte tion, laboristoj kaj oficistoj de la fabriko maltrankviliĝis same kiel la komunumanoj. Iu kamarado de la fabriko proponis, ke la oficistoj kaj laboristoj ŝparu akvon de ĉiutaga uzo por liveri ĝin al la produktaj grupoj al kiuj mankis akvo. Kaj ankaŭ laboristoj esprimis: "Akvo povas garantii pliprodukton de greno. Ni firme subtenas la proponon."

Post detala konsidero pri la propono, la partia komitato de la fabriko tuj sendis personojn por

Gelaboristoj helpas Kinjibrigadon en draŝado de rizo.



Laboristino kaj komunumano kune studas.

prospektori la trapasotan akvovojon kaj decidis konduki 2 trionojn el la akvo por ĉiutaga uzo al la montodeklivo tra tubo longa je pli ol 50 metroj; samtempe ili organizis 80 laboristojn kaj oficistojn por konstrui kanalon laŭ la deklivo longan je 160 metroj. Kiam la akvo torente fluis en la sekajn kampojn, la komunumanoj estis tre ĝojaj. Maljuna kamparano diris emocie: "Jen akvo sendita de niaj fratoj laboristoj!"

En la lastaj jaroj, la fabriko starigis du rondirajn ripargrupojn, kiuj iris de vilaĝo al vilaĝo por ripari agrikulturilojn. Ĝi ankoraŭ helpis, per malnovaj ekipaĵoj kaj eluzitaj materialoj, la komunumon starigi riparejon de agrikulturaj maŝinoj, prilaborojn de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj stacion por irigaciado kaj elkulturis nombro da teknikistoj por la komunumo kaj ĝiaj produktaj brigadoj.

La laboristoj rigardas subtenadon al agrikulturo kiel sian nerifuzeblan devon, dum la komunumanoj ofte kontribuis sian forton por konstruado de la fabriko.

Kiam la fabriko planis kulturigi legomojn kaj okupi sin pri porkobredado laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ "en la lokoj kun konvenaj kondiĉoj oni ankaŭ devas entrepreni produktadon de agrikulturo kaj flankokupoj", la komunumo kaj brigadoj aktive provizis ĝin per legomsemoj kaj porkidoj kaj sendis al ĝi veteranan kamparanon por instrui kul-

turan teknikon kaj veterinaron por preventi malsanojn de porkoj. Kiam la fabriko bezonis konstruajn materialojn, tiu kaj aliaj komunumoj kaj produktaj brigadoj liveris al ĝi brikojn, tegolojn, sablon, kalkon kaj aliajn bezonaĵojn. Krom tio ili helpis la fabrikon per fosado de 130,000 kubmetroj da tero kaj ŝtonoj.


Pli klare manifestiĝis la amikeco inter la laboristoj kaj komunumanoj en okazoj, kiam la fabriko trafis hazardan malfeliĉon. En iu profunda nokto subite altorentis montakvego. La protekta baraĵo post la nove konstruita domo estis disfaligita kaj kvar ĉambroj de la domo estis detruitaj. Kiam la komunumanoj de la ĉirkaŭaj produktaj grupoj informiĝis pri tio, ili alrapidis por helpo. Spite al pluvego, dekoj da komunumanoj kaj laboristoj energie fosis drenan kanaleton post tiu domo kaj forigis la koton en la tuj falontaj ĉambroj. Per persista klopodo ili fine firmigis la baraĵon kaj eldanĝerigis la domon.

FRUKTO DE AMIKECO

En la komuna laboro por konstrui la socialisman patrolandon, la laboristoj de Hianghongmaŝinfabriko kaj la komunumanoj de la popola komunumo Nianggia starigis inter si profundan amikecon. Nun jam starigis konstantaj rilatoj inter la fabriko kaj la komunumo kaj inter la laborejoj kaj la produktaj brigadoj kaj grupoj. En festaj kaj feriaj tagoj, laboristoj de la fabriko ofte vizitas produktajn brigadojn kaj helpas ilin redakti historion de la vilaĝo antaŭ kaj post la Liberiĝo, okazigi ekspozicion por klasa eduko kaj helpis la ĉirkaŭajn vilaĝojn starigi sinsekve 20 politikajn vesperajn lernejojn. Maljunaj malriĉkampanoj, kiuj multe suferis de ekspluatado kaj subpremado en la malnova socio estis ofte invititaj al la fabriko por fari al la junaj laboristoj edukon per rakonto de siaj travivaĵoj en la nova kaj malnova socio.

La laboristoj kaj komunumanoj kuraĝigis kaj stimulis unu alian en la movadoj “**Ierni de Daking en industrio**” kaj “**Ierni de Daĝaj en agrikulturo**”, kaj bona situacio aperis en la produktado de agrikulturo kaj industrio.

En la jaro 1971 Kinji-brigado akiris riĉan rikolton de arakido. La komunumanoj de tiu brigado speciale donacis kvanton da arakidoj al la tria laborejo, kun kiu ili havas konstantajn rilatojn. En printempo de la sekvanta jaro, la laboristoj semis la arakidojn kaj ricevis riĉan rikolton.



MULDAĴO DE DIABAZO

Fandita diabazo, kiel nova industria materialo, estas vaste uzata en fabrikoj kaj minejoj de Liaŭning-provinco.

La muldaĵo estas farita el dispecigita diabazo post likvigo kaj enverŝo en muldilon por ricevi deziratan formon. Tia diabaza muldaĵo enhavas grandan kvanton da silikato kaj estas rezistema kontraŭ frotado kaj korodo de acido kaj alkalo. Pro tio kaj sia malalta kosto, ĝi estas materialo kun vasta perspektivo.

Liaŭning komencis ĝin uzi en la jaro 1957 kaj ĝia pli ol 10-jara uzado atingis okulfrapan rezulton kaj ŝparis por la ŝtato grandan kvanton da ŝtalo, kolora metalo kaj aliaj materialoj.

UTILIGO DE POSTRESTANTA VARMO

En la lastaj du jaroj, la plejparto de la entreprenoj en la kvartaloj Tiedong kaj Liŝan de Anŝan, nia ŝtalprodukta urbo, ne plu bezonis karbon por akiri varmon por si, ĉar ĝin provizis unu granda instalaĵo utiliganta industriajn postrestantan varmon.

El la cirkulanta akvo de la Ĝenerala Kemia Fabriko de la Anŝan-a Fero-ŝtala Kompanio, kiu uzas ĝin por malvarmigi gason, tiu instalaĵo ricevas varmfonton, kiu estas konduktata al la du kvartaloj por varmigi ĉambrojn kun plankareo de 1,200,000 kvadrataj metroj. Tiu varma akvo, kiu fariĝas malvarma revene estas rekondukita al la nomita fabriko por rekomenci sian novan rondiron. Dank' al tiu aranĝo estas ŝparitaj por la ŝtato 240 fornoj, kun kies pli ol 1,000 hejtistoj kaj jara konsumo de pli ol 60,000 tunoj da karbo, favore al purigo de la aero.



Printempo

Venas al Giangnan

HONGŜAN

KIA hazardo! Post pli ol dudek jaroj mi venis denove en fiŝkapta sezono al Ĉangbaj-montaro, kiu ĵus sin vestis per printempa kostumo june verda.

Mi estis sur la vojo al la malgranda fiŝista vilaĝo Giangnan kuŝanta sur la suda bordo de la rivero Songgiang, kiun oni kutime nomas “la transborda”.

La heroaj vilaĝanoj postlasis en mia memoro neforgeseblan impreson, kvankam mi restis tie nur kelkajn horojn en la tempo, kiam ĉie arde brulis la Kontraŭjapana Rezistmilito. Ĉu la maljuna sekretario ankoraŭ vivas? Kiel nun estas Erva?...

Kvankam mi iris rapide, tamen kiam mi atingis la riverbordon, la luno jam leviĝis super la orientan monton kaj la pramo jam ĉesis funkcii. Survoje oni diris al mi, ke mi tamen trovos pramon, se mi nur laŭte vokos kelkfoje sur la bordo “Bofranj Ma”. La vilaĝo kuŝis sur la alta bordo trans la rivero. La konturoj de la domoj klare videblis en la lunlumo. La lampoj en la vilaĝo kaj la lumversanta luno interbrilis, impresante per agrabla heleco.

Mi formis ĉe la buŝo funelon per miaj manoj kaj laŭte kriis al la transa bordo: “Bo—fran—jo Ma—!” Eĥo tuj sonis de la montaro.

Nenia signo de reago estis videbla de la transa bordo. Malfeliĉe! Kion mi faru ekster atingebleco de loĝejoj, se tramisto ne venos? Mi refoje metis la manfunelon al la buŝo. Apenaŭ mi kriis “Bo—”, jam aŭdiĝis gajaj ridoj inter la abrikotaj arboj transe kaj la ridojn sekvis lakona respondo: “Malpacienas? Jen mi venas.”

Aŭdiĝis bruo de ĵetiĝo de ŝnuro sur la pramo, sur kiun tuj saltis lerte virina silueto. Videble ŝi

estis sperta remistino. Jen ŝi subite kaŭriĝis kaj forte puŝis la hokstangon dorsen. La boato sage sin elpafis kun plaŭdoj al la norda bordo. Puŝante antaŭen la boaton ŝi zumis fiŝistan kanton:

*Printempo venas al la bordoj de l' rivero,
Korojn varmigas la brilantaj sunradioj;
Daŭra revolucio kreas novaferon,
Daĝaj-spirito restos tra generacioj.*

Ŝia sonora kanto estis plena de varma amo al la vivo kaj saturita per optimismo.

Kiam la pramo estis proksima al la bordo, ŝi levis la bambuan hokstangon, puŝis ĝin oblikve antaŭen kaj la boato tuj turniĝis transverse. Poste ŝi refoje puŝis la hokstangon antaŭen en la direkto de la pruo kaj la boato haltis obeeme apud la bordo.

“Bonvolu ascendi,” ŝi diris ĝentile, ĵetante al mi rigardon.

Returninte la direkton de la boato ŝi denove kaŭriĝis malantaŭen kaj forte puŝis dorsflanken la longan hokstangon, kaj la boato sin ĵetis antaŭen kvazaŭ sago fendante la malhele blujn ondojn.

Mi sidis kontraŭ ŝi kaj atente pririgardis ŝin en la pli kaj pli hela lunlumo. La virino havis ĉirkaŭ 40 jarojn, kun honesta mieno kaj mallongaj haroj. Eble pro longa laborado en rivervento, ŝia vizaĝo havis malhele brunan koloron. Sur ŝia korpo elmontriĝis neelĉerpebla forto. La vestoj kaj botoj estis makulitaj de koto, verŝajne ŝi ĵus venis de kamplaboro. Kaj mi rimarkis, ke ŝi ĝuste okulmezuras min.

“Unuafoje vi venas ĉi tien, ĉu ne?” ŝi demandis min.

“Jam la duan fojon.”

“La duan fojon?” Ŝi pririgardis min denove, skuis sian kapon kaj diris ridante: “Neeble! Mi memoras ĉiun, kiu iam venis ĉi tien.”

“Mi venis ĉi tien unuafoje antaŭ pli ol 20 jaroj...”

“Ho, tiel!” Ŝi ordigis la harojn ĉe la tempioj kaj demandis: “Ĉu vi venas por viziti parencon aŭ por ia afero?”

“Por vidi kamaradojn...” mi diris.

“Kiujn? Mi bone konas ĉiujn miajn samvilaĝanojn junajn kaj maljunajn!”

Malfacilan demandon ŝi faris al mi. Pro hasteco siatempe, mi ja ne demandis la nomojn de la maljuna sekretario kaj Erva. Tiam mi povis respondi nur balbute: “La maljunan sekretariojn kaj...”

“Maljuna sekretario?” ŝi laŭte ekridis. “Ĝis nun jam laboris en nia vilaĝo pluraj maljunaj sekretarioj depost la Liberiĝo. Kiun el ili vi volas vidi kaj kia estas lia nomo?”

Kiel mi povus respondi! Kiam mi intencis fari klarigon, subite kelkaj fiŝoj plaŭdis salte super la akvo. Ŝi rapide kuŝigis la hokstangon kaj levis per la manoj tridentan fiŝforkon, kiu estis eljetita sible al la fiŝoj. “Certe ĝi estas karmo kun pezo de du-tri kilogramoj,” ŝi diris murmure. Apenaŭ ŝi finis siajn vortojn, vigle baraktanta karmo estis jam levita. Ŝi ĵetis la fiŝon en la holdon kun la fiŝforko. Repreninte la hokstangon, ŝi puŝis la boaton pli rapide antaŭen.

Mi estis sorĉita de la sceno. Ĉu ŝi ne estas...

“Kamaradino, mi petas de vi informon pri iu knabino, kiu estis dek-kelkjara antaŭ 27 jaroj, kiu veturigis min iuvespere trans ĉi riveron ĉe tiu ĉi sama pramejo. Tiam ŝi renkontis min kantante: “Tiel malvarme estas eĉ post vintro. Kiam al Giangnan venos la printempo?”

Mi vidis, ke ŝi falis en mediton.

“La laktonomo de la knabino estis Erva,” mi daŭrigis.

“Ah?” Ŝi longe rigardis min surprizite kaj fine rekonis min. Demetinte la stangon, ŝi alpaŝis kaj forte premis mian manon demandante: “Ĉu vi estas Ĝang Tieĝu, la malgranda kuriero?”

* * *

En iu printempa nokto antaŭ 27 jaroj, mi trapasis la malgrandan fiŝistan vilaĝon kun grava komisiono. Por transpasi la riveron mi devis kontakti kun Erva ĉe la pramejo laŭ antaŭfiksita sekreta signalo.

Tiunokte blovis ventego kaj impetaj ondoj frapadis la bordojn kvazaŭ furiozaj leonoj. Ĉe la riverbordo, mi estis timigita de la sceno. En la fiŝista vilaĝo brulis fajrego, kiu lumigis duonon de la ĉielo. Bruis pafoj, bojis hundoj kaj kriaĉis japanaj soldatoj. La katastrofo trudita de la japanaj imperiistoj al la ĉina popolo tiom indignigis min! Mi min kaŝis senmove en herboj sur la bordo. Mi ekaŭdis tiam densajn pafojn en malproksimo kaj pensis, ke certe venas niaj gerilanoj.

Subite vidiĝis du japanaj soldatoj puŝantaj knabinon dekkelkjaran al la transa riverbordo, kun gestado ordonanta, ke ŝi tuj transveturigu ilin per la pramo.

Kun obstine levita kapo, la knabino saltis sur la pramon. La boato antaŭen puŝiĝis balanciĝante sur la bruaj ondoj.

Kiam la boato atingis la rivermezon, kie pli furiozis la ondoj kaj vento, la knabino subite paŝis al la maldekstra flanko kaj forte puŝis la hokstangon



en la alia flanko de la boato, tiel ke ĝi tuj renversiĝis. Kun brua plaŭdo la du japanaj soldatoj estis ĵetitaj en la akvon. Sed kiom lertis la knabino en naĝado, ke ŝi rapide returnis la boaton kaj tuj saltis sur ĝin.

Ŝajne ankaŭ la du japanoj scipovis naĝi. Baldaŭ nigra pafiltubo emerĝis el la akvo kaj direktiĝis al la knabino. Pli rapide ol mi nun rakontas, arĝente brilanta tridenta fiŝforko jam forflugis el la mano de Erva kaj plantis sin en la kapon de la japano. Post kelkfoja balanciĝo en la ondoj, lia dika korpo estis forportita de la fluo. Dume la alia japano levis sian pafilon post ŝia dorso. En tiu kriza momento, subite iu emerĝis post lia dorso kaj per sia granda mano jam kaptis lian kapon forte ĝin subakvigante. Glu—glu—... Ambaŭ malamikaj soldatoj dronis.

La knabino returnis sian kapon kaj komprenis ke la maljuna sekretario ja sekrete naĝis post la boato kaj protektis ŝin.

“Maljuna sekretario!” la knabino kriis plorsingultante.

“Kiel danĝere, Erva!” La maljuna sekretario grimpis sur la boaton kaj rigardis ŝin ameme.

La neordinara rigardo de la maljuna sekretario ŝajne memorigis al ŝi gravan aferon. Ŝi faris rapidan ĉirkaŭrigardon kaj ekkantis mallaŭte:

*Tiel malvarme estas eĉ
post vintro.
Kiam al Giangnan venos
la printempo?*

Tio estis nia sekreta signalo.

En tiu nokto la maljuna sekretario kaj Erva eskortis min al la difinita loko.

Survoje ni interbabilis mallaŭte. Rigardante la meditantan Erva, mi demandis ŝin: “Kiel fartas via patrino?” Ŝi ne respondis min. Mor-dante sian malsupran lipon ŝi fiksrigardis antaŭen.

La maljuna sekretario diris: “Ŝia patrino mortis

survoje, kiam la familio venis al la Nordoriento pelata de malsatego.”

“Kaj kiel estas la patro?” mi demandis plue.

Erva komencis ploreti. Mi ekbedaŭris pri-miaj stultaj demandoj.

“Li mortis de malsano antaŭ du jaroj,” indigne diris la maljuna sekretario. “Ŝia patro fiŝkaptis dum duono de sia vivo por la fiŝtirano, tamen li mem neniam manĝis dece kuiritan fiŝon. Antaŭ sia morto, li volis manĝi fiŝon, kaj sub lunlumo Erva kaptis per forko unu fiŝon pezantan je duona kilogramo, kiun ŝi kuiris en akvo pro manko de oleo kaj spico. Sed kiam ŝi ĝin portis al la patro, li jam mortis.”

Ankaŭ mi eklarmis. La maljuna sekretario diris: “Kiam la kadavro de ŝia patro ankoraŭ kuŝis sur la terlito, alvenis jam la senkora fiŝtirano kiu diris, ke tio estas puno de la Fiŝa Dio pro ŝtela fiŝkapto. Poste li deklaris, ke ŝi ricevos konvenan punon pro malobservo al la rivera regularo. Erva levis la bovlon kun varma fiŝsupo, dirante: ‘Bone!



Puni laŭ via plaĉo!” kaj subite jetis ĝin sur la vizaĝon de la fiŝtirano... Tiunokte, nia gerila taĉmento jam venĝis nin per likvido de la tirano!”

Surgrimpinte iun montsupron kaj informiĝinte detale pri la irota vojo, mi petis ilin reiri hejmen.

Adiaŭinte la maljunan sekretarion kaj Erva-n, mi rapidis al mia celloko. Poste mi moviĝadis de loko al loko sub militfajro kaj neniam havis ŝancon iri al la bordoj de Songgiang por revidi la revolucion amason de la vilaĝo Giangnan.

* * *

Estis vere ne atendite, ke hodiaŭ, post pli ol dudek jaroj, ni denove renkontiĝis ĉe la pramejo. Ĝoje interbabilante ni iris al la vilaĝo.

Ŝi diris al mi: “La maljuna sekretario ankoraŭ vivas tre sane. Antaŭ du jaroj, lia edzino mortis. Mi venigis lin al mia hejmo kaj li vivas nun kun ni kiel mia patro!”

Pri sia familio, ŝi diris kun granda ĝojo: “Mia edzo Ma servas kiel estro de la milica kompanio de nia brigado post sia malmobiliziĝo. Nun li iris al la gubernia urbo por ĉeesti kunvenon. Mia unua infano aliĝis al la armeo kaj la dua nun lernas en mezlernejo... kaj mi, post la Liberiĝo, elektis por mi la nomon Giang Hiangĉun, — al mi tre plaĉas la vorto ‘ĉun’ (printempo — la trad.)!” Tion dirante ŝi gaje ekridis.

Preteririnte du vicajn da domoj, kamaradino Giang Hiangĉun faris kelkajn rapidajn paŝojn kaj puŝmalfermis iun barilpordon en la norda flanko de la vojo. “Jen nia hejmo.” Vidante ombron de larĝaŝultra homo sur la fenestra papero, mi eksentis fortan korbatadon pro emociiĝo kaj rapide enpaŝis la ĉambron post ŝi.

“Paĉjo, rigardu, kiu venas al ni!”

Fine mi jam staris antaŭ la maljuna sekretario nevidita jam pli ol dudek jarojn. Ni tuj manpremis forte unu kun la alia. La maljunulo mallarĝigis siajn okulojn kaj detale pririgardis min. Post longa momento li kapskuis kun bedaŭro kaj diris: “Mi vere jam ne povas rememori...” Sed post kiam lia “filino” memorigis al li, la maljunulo tuj kaptis miajn ŝultrojn kaj forte min skuis: “Kamarado Tieĝu, tion ĉi mi ja ne atendis!...”

Tiam knabino envenis kaj diris: “Sekretariino Giang, ĉiuj atendas vin.”

“Bone, mi tuj venos.” Giang Hiangĉun alportis kuiritan karpon kaj ŝia filino Hinhia alportis vaporantan rizaĵon. Je sia foriro ŝi diris: “Paĉjo,

vi prenu manĝon kune kun kamarado Ĝang, mi iras nun ĉeesti kunvenon.”

Mi demandis al la maljunulo: “Kredeble kamaradino Hiangĉun laboras kiel sekretariino de la partia filio jam de kelkaj jaroj?”

Onklo Giang plenigis por mi bovlon per rizaĵo kaj donis al mi paron da manĝbastonetoj. “Post la ordigo de la partia organizo en la antaŭlasta jaro,” li diris, “ŝi ekokupis tiun postenon. Mi povas diri sen troigo, ke kun plena energio, ŝi gvidas de tiam la komunumanojn en lernado de Daĝaj. En la du lastaj jaroj, la fizionomio de nia Giangnan ege ŝanĝiĝis! Krom plenumo de fiŝkapta tasko, ni ankaŭ konstruis digojn kaj rizkampojn. En la pasinta jaro, ni komencis kulturri rizplanton. Hiangĉun diris, ke ĉijare ni vendos ĉirkaŭ cent tunojn da rizo al la ŝtato. Nu, kamarado Tieĝu, bonvolu gustumi rizaĵon de nia fiŝvilaĝo!”

Post la manĝo, la maljuna sekretario instigis min ripozi frue.

Lacigita de longa piedirado, mi facile endormiĝis. Kiam mi vekigis je la 23-a horo, mi vidis, ke la lampo en la ĉambro de Hiangĉun ankoraŭ brilas. “Jam tiel malfrue,” mi diris, “tamen ŝi ankoraŭ ne ripozas?”

“Ŝi kutimiĝis al tio,” diris la maljunulo. “Ŝi lernas ĝis malfrue en ĉiu nokto.”

Ĝuste tiam aŭdiĝis klara alvoko de la transa bordo: “Bo — fran — jo — Ma —”

Same ŝi ne respondis, sed eliris grandpaŝe.

“Ĉu ne funkcias pramisto?” mi demandis.

“Jes,” diris la maljunulo, “tamen tiu loĝas malproksime, dum ni pli proksime. Cetere, oni bezonas transpasi la riveron en nokto certe pro ia urĝa afero, kaj gvidanta kadro ja ne povas kuŝi trankvile kaj ne iri helpi.”

Mi ekkomprenis ĉion. Rigardante la rondan arĝentan lunon, mi ekmemoris la kanton:

*Printempo venas al la bordoj de l' rivero,
Korojn varmigas la brilantaj sunradioj;
Daŭra revolucio kreas novaferon,
Daĝaj-spirito restos tra generacioj.*

Jes, nur en la granda epoko de Maŭ Zedong printempo apartenas al ni kaj ĉiam restos ĉe ni!

Ilustrita de Huang Giaju



DAJ-nacio estas unu el niaj nacimalplimultoj. Plejparto el ĝiaj pli ol 500,000 membroj loĝas en la Hiŝuangbanna-a Daj-nacia Aŭtonoma Subprovinco, Dehong-a Daj-Ĝingpo-nacia Aŭtonoma Subprovinco kaj la aŭtonomaj gubernioj Gengma kaj Menglian de Junnan-provinco ĉe nia sudokcidenta landlimo. Krome, en aliaj gubernioj de la provinco loĝas ĝiaj aliaj pli ol 100,000 membroj.

Ŝirmataj de la montaroj Junling, Nuŝan kaj Gaŭligong, la ebenejoj loĝataj de daj-nacianoj apud la riveroj Nugiang, Lancang kaj Ginŝa havas fekundan teron kovratan de ĉiamverdaĵoj kun subtropika klimato kaj abunda pluvo. En tiuj malgrandaj ebenejoj abunde produktiĝas rizo, sukerkano, kamforo, kafeo kaj aliaj ekonomiaj plantaĵoj kaj mango, kokoso, ananaso, banano kaj aliaj subtropikaj fruktoj. La puer-a teo de

Hiŝuangbanna delonge diskoniĝis en- kaj ekster-lande. Primitivaj arbaroj kreskas en ĝiaj montregionoj kaj minaj riĉfontoj kuŝas subtere. En la densaj arbaroj sin trovas pavoĵ, elefantoj, buceroj, rinoceroj kaj aliaj raraj birdoj kaj bestoj. De la antikveco, daj-nacianoj laboras kaj vivas en tiu ĉi bela kaj riĉa loko, kaj faras kontribuon en ekspluatado de la sudokcidenta limregiono de la patrolando, kune kun aliaj frataj nacianoj en la ĉirkaŭaĵo.



Daj-nacio havas sian longan historion. En la unua jarcento p.K. notoj pri ĝi jam troviĝis en han-lingvaj historiaj verkoj. Tiam ĝiaj ĉefoj multfoje sendis siajn delegitojn al Luojang por akcepti korteganan titolon de Orienta Han-dinastio, kio plifortigis la rilaton inter la daj-nacianoj kaj aliaj nacianoj de la patrolando. De la oka ĝis la dektria jarcento p.K., la regionoj loĝataj de Daj-nacio estis rekte administrataj de la lokaj registaroj de Nangaŭ kaj Dali. Laŭ literaturo de la komenca periodo de Juan-dinastio, tiam daj-nacio de Dehong-regiono ankoraŭ troviĝis en sklava socio. En la dinastioj Juan kaj Ming (1280-1644) ĝi eniris en la feŭdan


servutanan socion, kaj estis regata de *Tusi*-oj kaj *Tunong*-oj nomitaj de la centra registaro. Antaŭvespere de la Liberiĝo, la feŭda servuta sistemo ankoraŭ konserviĝis en malsamaj gradoj en Hiŝuangbanna, Dehong kaj aliaj regionoj.

En tiu socio, ĉiuj montoj, arbaroj kaj agroj apartenis al la feŭdaj mastroj. Ili konservis parton el la agroj kiel siajn bienojn kaj donis alian parton al siaj vasaloj, kaj la resta parto estis dividita pere de la ĉefoj de la vilaĝoj inter servutuloj, laŭ la distribua maniero de agroj postlasita de antikva kampara komunumo. Krom pago de peza rento kaj senpaga kulturado de agroj por la feŭdaj mastroj kaj vasaloj, la servutuloj generacion post generacio ankoraŭ devis fari por ili diversajn senpagajn servojn. Utiligante sian politikan privilegion kaj en koluzio kun la kuomintanga reakciularo, la feŭdaj mastroj ekspluatis la servutulojn per diversaj pezaj impostoj. Por subpremi kontraŭstaron de la servutuloj, la feŭdaj mastroj tenis en siaj manoj la reakcian feŭdan regpotencon, armeon, juĝejon kaj karceron, ili kruele subpremis la servutulojn per fortranĉo de orelo kaj mano kaj aliaj kruelaj punoj.

Dum la lastaj pli ol cent jaroj, la regionoj de la daj-nacianoj senĉese suferis armitan invadon fare de imperiistoj, tio puŝis la daj-nacianojn en ankoraŭ pli mizeran abismon. La nacia subpremo plus feŭda ekspluato baris la disvolviĝon de produktado, tiel ke la daj-aj vilaĝoj estis en malprospero. Kie estas ekspluatado kaj subpremado, tie estas kontraŭstaro. La daj-nacianoj faris bravan batalon de longa tempo kontraŭ la en- kaj eksterlandaj reakciuloj, kaj forte batis la invadintajn imperiistojn.

En la longtempa produktado kaj klasa batalado, la daj-nacianoj kreis sian kulturon kaj arton, kiuj estas grava parto el la kulturo de nia patrulando. Daj-nacio havas siajn lingvon, kalendaron (kun 639 p.K. kiel la unua jaro), literaturon pri daj-nacia historio, riĉan kaj buntan poezion kaj aliajn literaturaĵojn. La daj-nacianoj estas lertaj en kantado kaj dancado. Iliaj pavodanco kaj fiŝodanco, kaj iliaj muzikiloj elefantopieda tamburo kaj tamtamo havas sian apartan nacian artan stilon. Krome, ili ankaŭ kreas belajn skulptaĵojn kaj pentraĵojn. La bambuaj etaĝdomoj en salikaro, grandiozaj temploj kaj pagodoj, bambuaj pontoj sur riveroj ĉiuj manifestis apartan nacian arkitekturon.

La vilaĝoj de daj-nacianoj plejparte troviĝas inter verdaj bambuoj kaj arboj sur la bordoj de



Daj-aj lernantoj kaj instruistino de la elementa lernejo Giehian de Ŝujli-gubernio

riveroj kaj ĉirkaŭ lagoj. Dajaj viroj sin vestas per jaketo kun mallarĝaj manikoj kaj longa pantalono kaj portas turbanon sur la kapo. La daj-naciaj viroj ŝatas sin ornamati per tatuajoj. La virinoj ŝatas sin vesti per mallonga jaketo kun mallarĝaj manikoj kaj sitelforma jupo. Rizo estas ilia ĉefa manĝaĵo. Acidaj manĝaĵoj aparte plaĉas al ili. La "Akverŝa Festo" estas unu el iliaj ĉefaj festoj, en kiu ili verŝas akvon unu al alia por esprimi sian deziron de sano kaj feliĉo unu al alia. En Hiŝuangbanna, en tiu tago oni ankoraŭ okazigas konkurson de drakboatoj bele ornamitaj. La loĝantoj de proksimaj vilaĝoj venas por rigardi kaj la bordoj estas homplenaj en tiu tago.

Post la Liberiĝo, la daj-nacianoj fariĝis mastroj de la lando sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. En la regionoj kie koncentre loĝas la daj-nacianoj, stariĝis aŭtonomaj subprovincoj kaj gubernioj respektive en la jaroj 1953-1955. Post la demokratia reformo, la damninda servuta sistemo estis frakasita kaj la feŭdaj ekspluatado kaj subpremado estis likviditaj. Nun daj-naciaj

kadroj estas elkulturitaj de la Partio kaj multaj avangardaj elementoj fariĝis membroj de KPĈ.

Multe progresas la socialisma revolucio kaj konstruado en la regionoj de daj-nacianoj. De la jaro 1956, la agrikultura kooperativigo iom post iom disvolviĝis en la kamparo, kaj de la jaro 1969 popolaj komunumoj stariĝis en ĉiuj lokoj. Ankaŭ la loka industrio havis rimarkindan disvolviĝon. En Hiŝuangbanna, jam stariĝis fabrikoj de maŝinoj kaj kemisterko, elektrejo, karbominejo, preparejoj de teo kaj sukero ktp. La disvolviĝo de industrio akcelis la disvolviĝon de agrikultura mekaniĝo. Ĉiam pli multiĝis malgrandaj hidraŭlikaj elektrejoj funkciigataj de komunumoj kaj brigadoj, kaj elektraj lampoj instaligis al multaj dajaj domoj. Multe ŝanĝiĝis ĝia malfacila trafiko kaj nun formiĝis ŝosea reto kun la ĉefurbo de aŭtonoma subprovinco kiel centro. Pasaĝeraj aviadiloj flugas inter Kunming, Simaŭ kaj Baŝŝan en difinita dato.

Granda sukceso estas akirita ankaŭ en la aferoj de kulturo, edukado kaj higieno en tiuj regionoj. En ĉiuj lokoj stariĝis elementaj lernejoj, kaj ankaŭ mezlernejoj kaj mezgradaj teknikaj lernejoj stariĝis

unu post alia, kaj sekve de tio malaperis la fenomeno ke templo servis kiel lernejo, bonzo kiel instruisto kaj sutro kiel lernolibro. Ankaŭ la daja lingvo estas reformita post la Liberiĝo kaj la eldonitaj daj-lingvaj ĵurnalo kaj libroj forte akcelis la disvolviĝon de ĝiaj kulturo kaj edukado. En la daminda malnova socio, furiozis ĥolero, tifo, pesto kaj precipe malario en daj-aj regionoj. Post la Liberiĝo, la Partio kaj popola registaro starigis diversnivelajn kuracajn instituciojn kaj elkulturis daj-ajn kuracajn laborantojn, tiel ke la diversaj epidemioj estis briditaj. En Mangŝi, la "regiono ultra-malaria" fame konata en- kaj ekster-lande, kie loĝis antaŭe pli ol 5,000 loĝantoj, sed antaŭvespere de la Liberiĝo, restis el ili nur pli ol 1,800. Tamen nun ĝi fariĝis prospera industria urbeto kun ĉ. 20,000 loĝantoj.

Nun prospereco regas la regionojn de daj-nacio kaj la daj-nacianoj brave marŝas antaŭen kun plena memfido kaj firma batalvolo sur la socialisma vojo.

Ilustrita de Liu Bingjiang

Bredado de Moskuloj

HONGFU


LA kulturejo de kuracherboj Sankjuan en Nanĉuan-gubernio de Siĉuan-provinco situas en Ginfo-montaro najbare de la provinco Gujĝoŭ, kie belas altaj montoj kaj densaj arbaroj. Tiu kulturejo komencis bredi moskulojn jam antaŭ dek jaroj. Kiam ni venis al ĝi, ni vidis, ke grupoj da nigre brunaj moskuloj konkure manĝas el la manoj de bredistoj, iuj metis siajn antaŭajn piedojn sur la korpon de bredistoj kaj aliaj kuris petole. Bredistoj diris al ni: "Moskulo originis en Maerkang-altebenejo en nordokcidenta Siĉuan." Sed kiel ili sukcesis kapti kaj bredi la sovaĝajn moskulojn? Respondante al niaj demandoj kamaradoj de la kulturejo kondukis nin pririgardi ĝin.

Por protekti la riĉfonton de animaloj kaj kontentigi la kreskantan bezonon de moskoj de la ŝtato,

la laboristoj de la kulturejo decidis en 1962 ŝanĝi la staton, ke oni elprenis moskon antaŭe nur per kupto kaj mortigo de sovaĝaj moskuloj. Ili venis al la altebenejo Ma-erkang, iradis trans multaj montoj kaj riveroj spite al malbona vetero kaj fine kaptis 11 sovaĝajn moskulojn. Tamen post kelkaj tagoj, kvin el ili mortis pro malsano kaŭzita de terurigo. Poste komunisto Hia Heŝu kun kelkaj laboristoj daŭre vivis dum unu tuta jaro sur la montoj kun dense kreskantaj arbaroj, altaj je 3,000 metroj super la mara nivelo. Ili esploris kaj observadis la vivon kaj aktivadon de sovaĝaj moskuloj, timante nenian malbonan veteron kaj minacon de sovaĝaj bestoj, kaj fine sciis, ke moskulo estas besto malpacienca, izoligema kaj timema, kaj ke la kaŭzo de ilia morto kuŝas ĉefe en tio,



Manĝigo de moskuloj



Elpreno de mosko el vivanta moskulo

ke ili estis forte kaj longe teruritaj, kiam oni kaptis ilin. Sekve ili kaptis 25 sovaĝajn moskulojn per la nova ĉasmetodo kaj transportis ilin vivaj al la kultivejo.

La medio de la kultivejo multe diferencas de la natura hejmloko de la sovaĝaj moskuloj. Kion oni devis fari por ke la moskuloj povu akomodiĝi al la nova medio? En la komenco, la bredistoj bredis la moskulojn per la metodo taŭga al bredado de cervoj, opiniante ke moskulo apartenas al la familio de cervoj, sed ili malsukcesis. Li Kjunhian, vicsekretario de la kultiveja partia komitato, kunvokis teknikistojn kaj laboristojn al kunveno kaj analizis kune kun ili la karakterojn de moskulo distingajn de cervo kaj decidis iom post iom akumuli sperton en la praktika laboro. La teknikistoj Deng Ĝengji kaj Li Ĝengĉang zorgeme observadis la kutimon, manĝadon, dormadon kaj malsanadon de vira kaj ina moskuloj kaj faris detalajn notojn. Post certa tempo da observado ili trovis, ke nutraĵoj grave influas la kreskadon de moskulo. Lokanoj diris, ke moskuloj bezonas diversajn nutraĵojn. Kiuj plantoj do estas plej ŝatataj de la moskuloj? Hia Heŝu, estro de la scienc-esplora grupo, ĉiutage iris kune kun teknikistoj en la montojn por kolekti diversajn arbofoliojn, herbojn kaj sovaĝajn fruktojn kaj ilin donis al la moskuloj por ke la lastaj prenu ilin laŭplaĉe. Per tio ili iom post iom konis, kiuj nutraĵoj estas plej ŝatataj respektive de moskuloj maljuna, matura kaj juna kaj atingis novan sukceson en bredado de sovaĝaj moskuloj.

Post tio la bredistoj decidis fiksi vokan signalon por manĝigi la moskulojn per nutraĵoj plej ŝatataj

ke de ili por la lastaj kutimiĝu al proksimiĝo de homoj. Oni ankaŭ faris bruojn en kaj ekster la bredejo kaj kontaktigis la moskulojn kun homoj kaj aliaj animaloj por ke ili iom post iom adaptiĝu al la cirkonstancoj. Post certa tempo de dresado, la timemaj moskuloj fariĝis kuraĝaj kaj ŝanĝis sian izoliĝemon.

Dank' al longtempa diligenta laboro de la bredistoj, la sovaĝaj moskuloj fine malsovaĝiĝis. Iutage, ventego detruis tabulan muron de stalo kaj kvin moskuloj forkuris sur monton. Ĉiuj laborantoj brule maltrankviliĝis. Sed en la sama tago du el ili revenis. Forpasis la dua kaj tria tagoj, la aliaj tri moskuloj ankoraŭ ne revenis, kaj la bredistoj pensis, ke ili perdiĝis. Sed je la kvara tago revenis ankaŭ ili.

Multe kuraĝigite de la sukcesa bredado de la moskuloj, la laboristoj de la kultivejo komencis esplori la eblecon de elpreno de moskoj el vivaj moskuloj. Je la komenco ili elprenis moskon per operacio post anestezo. Kvankam tiamaniere oni povis ricevi moskon sen mortigo de moskuloj, tamen la kvanto kaj kvalito de moskoj estis malbone influitaj. Post multfoja provado fine estis kreita nova metodo simpla kaj facila: du homoj tenas la kruojn de la moskulo, tria homo elprenas moskon per arĝenta kulero post kiam li steriligas la moskujon. Dank' al uzo de la nova metodo, la moskoj produktitaj de la kultivejo estas ne nur altkvalitaj, freŝkoloraj kaj aromaj, sed ankaŭ same efikaj kiel la mosko de sovaĝaj moskuloj. Nun la kultivejo jam havas 110 moskulojn kaj povas liveri al la ŝtato pli kaj pli multe da diversaj moskoj.



Huang Ĉaŭ – Gvidanto de Kamparana Insurekcio

GI ĈAŬ

EN la lastaj jaroj de Tang-dinastio (618-907 p.K.) eksplodis granda insurekcio de kamparanoj en la limregiono de la nunaj provincoj Ŝandong kaj Henan. Huang Ĉaŭ estis fame konata gvidanto de tiu insurekcio.

Huang Ĉaŭ estis naskita en Juankju-gubernio (la nuna Heze-gubernio de Ŝandong-provinco). Li lertis en rajdado kaj arkopafado, ŝatis librolegadon kaj ofte sin montris malcedema, sindonema kaj helpema.

En la lastaj jaroj de Tang-dinastio ĉiam pli intensiĝis la kontraŭdiroj inter la kamparanoj

kaj la reganta klaso. La reĝimo estis ekstreme putra pro senkapableco de la imperiestro, potenco monopoligita de eŭnukoj, batalado inter sektoj kaj diboĉado de la reĝa familio. La burokratoj, nobeloj kaj bienuloj grandnombre aneksis al si teron de kamparanoj kaj la reganta klaso senĉese ŝarĝis la kamparanojn per pezaj impostoj kaj servutoj, kio pelis la lastajn en bankroton kaj mizeron.

En la jaro 873, okazis grava sekego en Guangdong regiono (de la pasejo Tongguan, Ŝenhi-provinco en la okcidento ĝis la marbordo de Ŝandong-provinco en la oriento), la kamparanoj devis ŝtopi



sian stomakon per herboj kaj arboŝeloj. Sed la lokaj registaroj ankoraŭ perforte devigis kamparanojn pagi imposton kaj renton, tiel ke ili dronis en senelirejo kaj kolektiĝis al ribelo. En la jaro 874, Vang Hianĝi kun kamparanaj amasoj sub sia gvido ribelis en Ĉangjuan-gubernio (en la nuna Henan-provinco) kaj sin nomis kiel “Ĉefgeneralo de Egaleco anstataŭ la Ĉielo”. La nomo spegulis deziron de tiamaj kamparanoj por egale dividi la teron. En la sekvanta jaro, respondante lian alvokon, Huang Ĉaŭ kolektis milojn da kamparanoj en sia hejmloko. Baldaŭ la du trupoj kuniĝis kaj grandiĝis en armitan forton kun dekmiloj da homoj.

La regantoj terurigiĝis de la insurekcio de kamparanoj kaj haste sendis armeon por subpremado. La insurekcia trupo batalis sagace kaj gajnis multajn venkojn en Henan, Hubej, Anhuĵ kaj aliaj, kaj ĝi rapide fariĝis armeo kun pli ol cent mil personoj. En la jaro 878 Vang Hianĝi mortis en batalo, liaj trupoj sin turnis al Huang Ĉaŭ kaj subtenis lin kiel reĝon. Huang Ĉaŭ fondis eraon Vangba kaj estis nomata kiel “Ĉefgeneralo kontraŭ Ĉielo”. Li unuapaŝe formis regpotencon de kamparanoj per starigo de administracioj kaj decidis renversi la regadon de Tang-dinastio.

En la jaro 878, por eviti decidan batalon kontraŭ la ĉefa forto de la imperiestra armeo kaj ŝtopi

ĝian fonton de provizaĵoj, Huang Ĉaŭ decidis movi sian forton al la regiono sude de Jangzi-rivero, malforte defendata de la registara armeo. Sagace aplikante strategion eviti fortan por ataki la malfortan, li afekte atakis Luojang — la orientan ĉefurbon de Tang-dinastio, kaj utiligante eraran prijuĝon de la malamiko, li subite gvidis sian armeon marŝi suden trans la riverojn Huajhe kaj Jangzi, kaj tra Gianghi, Ĝegiang kaj Fugian, kaj fine prenis Kantonon, la gravan urbon en la sudo.

Okupinte Kantonon, la insurekcia armeo faris ripozon kaj ordigon kaj samtempe preparis sian ekspedicion al Ĉang-an (la nuna Hi-an de Ŝenhi-provinco), la reg-centro de Tang-dinastio. Ĝi ankoraŭ publikigis sian deklaron por kondamni la krimon de Tang-dinastio.

En la jaro 879, Huang Ĉaŭ kolektis siajn trupojn en Gujlin de Guanghi kaj gvidis ilin norden laŭ Hianggiang-rivero per miloj da lignaj flosoj mem faritaj. La insurekciaj trupoj akiris multan subtenon de la kamparanoj pro sia severa disciplino. Trapasinte Hunan, Hubej, sudan Anhuĵ, okcidentan Ĝegiang, la riverojn Jangzi kaj Huajhe, ili lanĉis sian atakon al Luojang, kaj la defendaj trupoj de Tang-dinastio kapitulacis unuj post aliaj. Tiam, la tuta armeo de Huang Ĉaŭ jam nombris ĉ. 600,000 soldatojn. Poste ĝi militiris okcidenten kaj kon-



GI JING

LA jaŭoj estas unu el la naci-
malplimultoj dise loĝan-
taj en suda Ĉinio. En iu jaŭ-a
popola komunumo mi havis oka-
zon vidi la enhavoriĉan kulturen
vivon de tiu nacieco.

Hele ekbrilis lampoj en jaŭ-a
vilaĝo, kiam nokto falis sur ĝin.
Tiam ĝojo tuj regis la kulturen
domon de la produkta brigado.
Vilaĝanoj ĉu junaj aŭ maljunaj
venis ĉi tien por regali sin per
gaja amuza vespero.

Leviĝis la kurteno. Grupo da
geknaboj dolĉe kantis kaj rikol-
tis varman manklakadon de la

rigardantoj. Ankaŭ la kantoj,
dancoj, parolaj teatraĵoj, operoj
kaj aliaj programeroj prezenti-
taj de amatoroj de la produktaj
grupoj plaĉis al la komunumanoj.
La longtambura danco “Ĝojo
de Riĉa Rikolto”, kiun prezentis
la arta propaganda grupo de la
brigado, bone montris la ĝojon
de la jaŭ-aj popolanoj, kiuj gajnis
riĉan rikolton venkinte troseke-
con per konstruado de irigaciaj
kanaloj.

En plej varma manklakado
jaŭ-a onklino iris sur la scenejon.
Ŝi estis la sesdektrijara kantis-
tino Tang Dingkiaŭ. Per mem

verkita kanto ŝi memorigis sian
sufreplenan vivon antaŭ la Li-
berigo. Tiam sub la ekspluata-
do kaj subpremado fare de bie-
nuloj ŝi devis loĝi en ŝtonkaverno,
satigi sin per sovaĝaj legomoj
kaj kovri sian korpon per arbo-
folioj. Poste, per gaja melodio
ŝi prikantis la ŝanĝojn de sia
montvilaĝo post la Liberiĝo, la
feliĉan vivon de la jaŭ-aj popo-
lanoj kaj la grandan amzorgon
de Prezidanto Maŭ kaj la Partio
al la nacimalplimultoj. La ri-
gardantoj laŭdis, ke ŝi elkantis
la koran senton de la jaŭ-aj
popolanoj.

keris la pasejon Tongguan — la “pordon” de
Ĉang-an, kaj la imperiestro de Tang-dinastio
Hiĝong konsterniĝe fuĝis al Siĉuan.

En januaro de la jaro 881, Huang Ĉaŭ gvidis
siajn trupojn triumfe iri en Ĉang-an. La loĝantoj
bonvenigis ilin ambaŭflanke de stratoj. Huang
Ĉaŭ fariĝis imperiestro kaj alinomis sian regnon
kiel Daki kaj sian eraon kiel Gintong. La insu-
rekciaj trupoj malfermis konservejojn de la pasinta
registaro, dividis grenon kaj riĉaĵojn al malriĉuloj,
kaj subpremis la reakciajn registarajn oficistojn,
kiuj intencis fari kontraŭstaron.

Enirinte la ĉefurbon, Huang Ĉaŭ ne daŭre per-
sekutis la forfuĝantajn malamikojn, kio donis al
la malgranda Tang-kortego kaj ĝiaj restaj fortoj en
diversaj lokoj ŝancon por spiro kaj rekolektiĝo.
La imperiestro Hiĝong unuflanke subaĉetis ofici-
rojn de la insurekciaj trupoj per konspiraj rimedoj
kaj, aliflanke, organizis armitajn fortojn de bienu-
loj en diversaj lokoj kaj faris komploton kun ar-
mitaj trupoj de Ŝatuo. Ili formis sieĝon al la
regpotenco de kamparanoj. En la urbo Ĉang-an
mankis greno al centoj da miloj da militistoj kaj

krome grava generalo Ĝu Ven perfidis Huang
Ĉaŭ, kio metis la insurekciajn trupojn en malfaci-
lan situacion.

En majo de la jaro 883, Huang Ĉaŭ devigite
retiris siajn trupojn el Ĉang-an al Henan. Post
pluraj bataloj, konsumiĝis iliaj fortoj. En majo
de la jaro 884 la insurekciaj trupoj estis venkitaj
de la trupoj de Tang-dinastio. Sub tia situacio
Huang Ĉaŭ kun mil soldatoj retiriĝis al Ŝandong,
kaj fine li estis mortigita en Langhu-valo de la monto
Tajŝan (en okcident-suda parto de la nuna Lajvu-
gubernio de Ŝandong).

La kamparana revolucio gvidata de Huang
Ĉaŭ finiĝis per malvenko, ĉar ĝi ĉiam kondukis
movadan militon, ne starigis firman revolucion
bazlokona kaj ne povis solvi la agraran problemon.
Sed, dum dek jaroj, la insurekciaj trupoj peze batis
la regadon de la feŭda bienula klaso en la vastaj
regionoj de la basenoj de la Flava Rivero, kaj la ri-
veroj Jangzi kaj Perlo. Tio rapidigis la disfalon de
la feŭda Tang-dinastio kaj skribis brilan paĝon en
la historio de kamparana revolucia milito de nia
lando.

Novaj Ĉinaj Esperantaj Eldonaĵoj

Observejo 3 (bildrakonto por infanoj)

formato: 14.5 × 18.5 cm., 50p., prezo: £ 0.08, US \$ 0.20

La broŝuro kun serio da koloraj bildoj rakontas kiel gefratoj transsendis dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito gravan mesaĝon al la gerila taĉmento, sagace kaj brave trapasinte la defendan linion de la malamikoj, post kiam la gerila kuriero estis mortigita de japanaj diabloj.

Ŝaŭŝan (ilustritaj poŝtkartoj)

12 pecoj, prezo: £ 0.08, US \$ 0.18

Tiu ĉi serio da poŝtkartoj konigas la lokojn kie siatempe vivis kaj laboris Prezidanto Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo.

La Irigacia Kanalo Ruĝa Flago (ilustritaj poŝtkartoj)

12 pecoj, prezo: £ 0.08, US \$ 0.18

Por venki sekecon, la popolanoj de Linhian-gubernio de Henan-provinco brave batalis dek jarojn en malfaciloj, trahakante montojn kaj traborante tunelojn, kaj fine konstruis la irigacian kanalon Ruĝa Flago kun longeco de ĉ. 1,500 kilometroj. Tiu ĉi serio prezentas la ĉefan parton de la kanalo.

Ruĝa Signal-lanterno (ilustritaj poŝtkartoj)

14 pecoj, prezo: £ 0.08, US \$ 0.18

Ŝagiabang (ilustritaj poŝtkartoj)

12 pecoj, prezo: £ 0.08, US \$ 0.18

Ruĝa Virina Taĉmento (ilustritaj poŝtkartoj)

16 pecoj, prezo: £ 0.12, US \$ 0.30

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo (P.O. Kesto 313, Pekino)

Mendeblij ankaŭ ĉe la perantoj de El Popola Ĉinio

Novaj Virinoj

Muziko de Nie Er

Emocie kaj ekscitiĝe


Novaj vortoj de kolektivo



No- vaj vi- ri- noj, ni ve- ki- ĝin- ta la- bo- ru- la- ro,




Ni el- sta- ri- gu la brus- ton al ba- ta- lo. La mil-



ja- ran ka- te- non rom- pu, stur- mu el kar- cer',



Ni ba- ta- lu por no- va vi- vo kaj li- be- ro.



Ku- ne kun fra- toj en su- fe- ro, luk- tu!



Luk-tu ni kon- traŭ l'bar- ba- ra maĭ- no- va so- ci-



o! Luk- tu! Le-vu ni ŝtor- monde mon- da



re- vo- lu- ci- o. Kun ru- ĝa fla- go,



lan- coj, gla- voj, u- nu- a- ni- me luk- tu



bra- ve, en l' aŭ- ro- ro ni stur- mu sen halt',



No- vaj vi- ri- noj es- tu l' a- van- gard'!

Sur la Kovrilo:

Por la sano de infanoj

Sur la Dorskovrilo:

Draka Pordo sur la Okcidenta
Monto de Kunming



EL POPOLA ĈINIO 人民中国杂志

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 3 (176) 1973

Ĉefa Enhavo

La Kampara Higiena Afero de Ŝandong-provinco	1
Koopera Kuraco de Jonghin-brigado	4
Ŝi Denove Ekiras sur la Tero	7
Ĉinaj Drogoj	9
Mi Amas la Vastan Kamparon	10
Kamparana Selektisto Laj Hongde	13
Tajŝan — Hejmloko de Ĉinaj Elmigrintoj	15
Belaj Konkaj Bareliefoj	18
Ĝuang-a Brokato	20
Nova Amikeco Pompas sur la Antikva Vojo	22
La Rumana Popola Kantodanca Ensemblo "Banatul" en Ĉinio	25
Vasta Unuiĝo de la Landoj de la Tria Mondo	27
Ili Estas Samfamilianoj	31
Printempo Venas al Giangnan (<i>novelo</i>)	34
Daj-nacio	38
Bredado de Moskuloj	40
Huang Ĉaŭ — Gvidanto de Kamparana Insurekcio	42
Ĝojo de la Jaŭ-aj Popolanoj	44
Novaj Virinoj (<i>kanto</i>)	46

Feliĉaj Infanoj de Ĉinio

Infanoj de la urbo Ŝantoŭ, Guangdong, pentras Tian-anmen-pordegon de Pekino.





Lernantoj de la urbo Vuĝoŭ de Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono prenas lecionon.

Kazaĥaj infanoj de Hingiang





Etaj amatoroj de tabloteniso



Laboremo jam en infaneco

Pando

PAROLANTE pri pando, oni nature pensas pri ĝia rondeva kaj grasa korpo kun neintermiksitaj nigraj kaj blankaj haroj, ordema paŝmaniero, lerta kaj vigla grimrado kaj petolemo. Ĝi estas vere ŝatinda besto.

Pando estas unu el la specialaj bestoj de Ĉinio, kiu vivas en Kjonglaj-montaro de Siĉuan-provinco. Ĝi estas relative antikva besto, kiu vivis kun praavoj de la homoj sur la tero antaŭ 600,000-1,000,000 jaroj. Poste ĝi iom post iom evoluiĝis kaj transloĝiĝis en primitivan arbaron sur montoj 2,000 ĝis 4,000 metrojn altaj super la mara nivelo. Ĝi kutimas vivi en alta malvarmega loko, tre timas varmon, sed ne froston. Ĝi estas milda kaj ne atencas homojn aŭ dombrutojn. En ordinara tempo, ĝi ĉefe sin nutras per bambudoj, bambuaj folioj, junaj bambuoj kaj sovaĝaj fruktoj.

Ĉar nuntempe en la naturo troviĝas tre malmultaj pandoj kaj ili vivas en lokoj tre izolaj, tial ili estis trovitaj de zoologiaj laborantoj nur en 1869. De tiam sciencistoj tre interesiĝis pri iliaj apartaj historio kaj kutimoj. Post la Liberiĝo, grandaj pandoj estas ekspozitaj sinsekve en la zoologiaj ĝardenoj de nemalmultaj urboj de nia lando. Kaj en la Pekina Zoologia Ĝardeno, oni unuafoje sukcesis generigi grandan pandon sub bredado.



